


l'espéranto



la langue de l'amitié  
sans frontières



esperanto



la lingvo de l'amikeco  
sen landlimoj

## Une nouvelle rencontre internationale dans les Vosges pittoresques !

Unu el la domoj en "Le Vic"

Nia stagejo



### ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle  
pour la promotion  
de la langue  
internationale  
**ESPERANTO**  
regroupant

les départements  
**Meurthe-et-Moselle (54)**  
**Meuse (55)**  
**Moselle (57)**  
**Bas-Rhin (67)**  
**Haut-Rhin (68)**  
**Vosges (88)**

Maison des Jeunes  
et de la Culture  
« Philippe Desforges »  
27, Rue de la République  
FR-54000 NANCY

#### ABONNEMENT / ABONO

annuel / jara  
14 €  
eksterlando  
18 €

**esperanto**  
France-Est

La première fin de semaine du mois d'avril 2011, l'association **ESPERANTO France-Est** organise avec l'aide de Mesdames Simone CAJELOT et Ginette MARTIN son soixante-neuvième stage régional d'Espéranto.

Les participants auront l'occasion de pratiquer la Langue Internationale à **BAN-SUR-MEURTHE / CLEFCY** dans le "Centre de Séjour des Amis du Vic".


Ils pourront découvrir les plantes locales présentées par une spécialiste et faire connaissance avec l'Albanie en s'inscrivant pour le séminaire animé par Monsieur Bardhyl SELIMI, un professeur espérantophone de TIRANA.

La soirée musicale sera assurée par le baryton **FAMO**.

Un stage à ne pas manquer !!!

( fiche d'adhésion dans ce bulletin )

*Heureuse et fructueuse année 2011  
aux fidèles lecteurs et lectrices de "La Informilo"*

<b>Espéranto France-Est</b>		<b>Orient-Franca Esperanto-Asocio.</b>
<b>La Informilo</b>	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale <b>ESPERANTO</b>	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo <b>ESPERANTO</b>
<b>Rédaction: Redaktoro:</b>	<b>PoI DENIS, 5, Chemin de Blamecourt, 55000 BAR LE DUC</b>	
	poŝ-tel. 06 98 09 62 81	pol.denis@orange.fr
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit Texte envoyé par courriel Document avec mise en page	un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	telefono	Ret-adresoj
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Vic-sekretario <i>Vic-secrétaire</i>	S-ro Jacques HERLÉ 1, chemin du Berger 57380 MAINVILLERS	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
Kasisto <i>Trésorier</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.89.45.62.89	andreo.ag08@free.fr
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	thibias.jean-luc@wanadoo.fr libroservo.ef@wanadoo.fr
Redaktoro <i>Rédacteur</i>	S-ro PoI DENIS 5, Chemin de Blamecourt 55000 BAR LE DUC	06.98.09.62.81	pol.denis@orange.fr
Aliaj komitatanoj  <i>Assesseurs</i>	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
	S-ro Frédéric PORRETTI	03.69.77.07.24 06.15.70.15.73	popo68@evhr.net
	S-ro Roger DEGRELLE	03.82.21.92.40	roger.degrelle@wanadoo.fr
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	jeanmarie.kiry@sfr.fr
	S-ro Cyrille HURSTEL	08.70.57.68.00	cyrille.hurstel@free.fr
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Mireille ANTONI-TURCK	06 34 33 68 93	mirantur@hotmail.com
	S-ro Bertrand WICK	03.89.69.16.63	bertrand.wick@wanadoo.fr
	S-ro Alian Collignon	03.83.40.35.60	colli.alano54@orange.fr

<b>Abono al La Informilo</b> →	Francio: 14 eŭroj Eksterlando: 18 eŭroj	← <b>Abonnement à La Informilo</b>
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	<b>Esperanto France-Est</b>	← <b>Paiement par chèque au nom de</b>
Pagoj per ĝiro al jena konto →	<b>CCP 1997 72 W NANCY</b>	← <b>Paiement par virement au compte</b>
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

**Sommaire 152**

1 page frontale	19 Condon et l'Algérie
2 ours	20 critique littéraire
3 édito	21 kaléidoscope
4 rapport EFE	22 / 23 du Québec
5 / 6 stage printemps	24 Air France
7 stage Nilvange	25 catastrophe en H
8 accueil Atilio	26 tour du monde vélo
9 activités	27 / 28 libroservo
10 UEA	29 / 30 cotisations 2011
11/12/13 Comaruga	31 page détente
14 Chinois à Strasbourg	32 photothèque
15 à 18 Tajvano	

ISSN 0291 6037 trimestriel  
bulletin d'information bilingue sur l'espéranto  
édité par l'association culturelle  
**Esperanto France-Est**  
MJC Philippe Desforges – 27 rue de la République  
**FR - 54000 NANCY**  
Directeur de la publication : **Edmond LUDWIG**  
Rédacteur : **PoI DENIS**  
dépôt légal : **31 décembre 2010**  
imprimé par l'Office Central de Coopération à l'Ecole  
Place de l' Ecole Normale, FR - 55000 BAR-le-DUC  
**N° CPPAP : 0409 G 83517**

Karaj gefederacianoj !



En la jaro 2010, la Nobel-premio pri medicino estas atribuita al John EDWARDS pro la sukceso vivigi retorto-bebojn. Eble vi demandas vin, kial mi komencas mian "angulon" per tiu novaĵo !!!

Nu ! La unuaj retorto-bejoj nun aĝas 32 jarojn kaj plensanas ! Kaj ESPERANTO, nia lingva retorto-bebo jam aĝas 123 jarojn, kaj ties iniciatinto ne ricevis Nobel-premion !!!

Malgraŭ tio, kaj malgraŭ la fakto, ke neniu ŝtato en la mondo ankoraŭ oficialigis ties uzon en la publika kaj profesia vivo, ĝi pluevoluas kaj, male al homaj estaĵoj, ju pli ĝi maljuniĝas, des pli ĝi viglas ! Ĉu tio ne estas mirakla lingvo ?

Ĉar tiu numero de LA INFORMILO aperos, aŭ fine de la jaro, aŭ komence de la nova, mi deziras al vi ĉiuj, ĉion bonan por la nova jaro kaj ankaŭ sukcesan agadon kaj agrablan esperantumadon.

Ni rendevuu plej frue por nia jara *Ĝenerala Kunveno* ( pri kiu vi legos aliloke ), kaj nia printempa staĝo en la Vogezoj. Venu multnombraj kaj invitu viajn geamikojn !

Edmond LUDWIG

La jara **Ĝenerala Kunveno** de ESPERANTO FRANCE-EST okazos

**esperanto**  
France-Est

Dimanĉe, la 20-an de februaro 2011  
ekde la 10-a horo, en Saint-Dié-des-Vosges



Ĉiu membro ricevos kunvokilon kun *la preciza loko, la tagordo, la agadraporto kaj la financa raporto.*

Rezervu al vi tiun tagon kaj venu multnombre !

Edmond LUDWIG

**esperanto**  
France-Est

Ni rememorigas al vi la retejon de nia asocio **Esperanto France-Est**

<http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>

Krome eblas ankaŭ atingi ĝin per

<http://esperanto.france.est.free.fr>

Vi estos informitaj ne nur pri la vivo de nia asocio sed ankaŭ pri aktivajoj de la lokaj grupoj, de unuopuloj ... kaj pri Esperanto ĝenerale !

Multaj ligoj ebligas al vi trovi aliajn interesajn retejojn en Francio kaj en la mondo  
La nova rubriko "nos albums photos" revivigas okultrafe regionajn eventojn... kaj alilokajn !  
indas ofta vizito !

apprendre  
l'espéranto



chez soi !

rapidité ...

efficacité ...

deux maîtres- mots

de notre cours

par correspondance !...



un matériel adapté



une technique éprouvée



un réseau d'animateurs compétents



un savoir immédiatement opérationnel

"☆☆☆ ?..."

-☆☆☆☆ !"



Edmond LUDWIG

26, route de la Schlucht

68140 STOSSWIHR

03 89 77 52 55

une diffusion

sur toute la région

...et au-delà !



La estraro/komitato de EFE realigis dum la pasinta agadjaro la jenajn erojn :

Subteno okaze de vizito de *ProbalDaŝgupto* al Strasburgo kaj Mulhouse.

Serĉado kaj vizitado de eblaj staĝejoj en la proksimeco de FRAIZE por la venonta printempa staĝo en la departemento Vosges. Preparado de la aludita staĝo en *LE VIC* kun la respondeculinoj *Simone CAJELOT* kaj *Ginette MARTIN*.

Funkciado de la *Libro-servo de EFE* okaze de staĝoj kaj perkoresponde fare de *Jea-Luc THIBLAS*.

Enretigo de la katalogo de la aludita Libro-servo fare de *Jean-Luc THIBLAS* kaj *André GROSSMANN*.

Daŭra funkciigo de PKK ( perkoresponda kurso ) fahre de *Edmond LUDWIG*. Tri aliĝantoj en 2010.

Surpaneligo de la 12-panela ekspozicio pri ESPERANTO fare de *Edmond LUDWIG*, dank' al senpaga disponigo de paneloj fare de *Michel BASSO*. Pri la kalendaro por rezervado de la aludita ekspozicio respondecas *Jacques HERLÉ*.

Daŭra ĝisdatigo de la ret-paĝoj <http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr> fare de *André GROSSMANN*.

Portempa venko post denovaj klopodoj : *Commission Paritaires des Publications et Agences de Presse (CPPAP)*

konsentas pri pluigo de favoraj tarifoj por la dis-sendado de LA INFORMILO dum 4 jaroj.

Regula interkontaktado de la komitatanoj père de la dissendo listo "Nia komitato".

Informado al dissendo-listo Alzaco-Loreno : [Alzaco-Loreno@yahoogroupes.fr](mailto:Alzaco-Loreno@yahoogroupes.fr)

Kunredaktado de LA INFORMILO daŭre prizorgata de *Pol DENIS*.



## PANELOJ POR EKSPOZICIO

Dum ekzpozicio en Besançon kelkaj paneloj de la ekspozicio de EFE estis difektitaj, sed Sinjorino Renée CORREY decidis aĉeti novan ekspozicion de EFE, pro kio ni ege dankas al ŝi.

Pro problemoj en la firmao, kiu kutimis fabriki la panelojn por ESPERANTO-FEANCE, la refaro daŭris iom longe kaj ni ricevis nur malrigidajn panelojn, kiujn necesis glui sur rigidajn panelojn, kiujn afable disponigis al ni la konstru-firmao de Sinjoro Michel BASSO.

La 12 paneloj estas alkroĉeblaj ĉe muro/vando aŭ starigeblaj sur tabloj.

Informojn pri la ekspozicio vi trovos sur la retpaĝoj de EFE : <http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>

La liston de la uzintoj/uzantoj/uzontoj prizorgas

Jacques HERLÉ, 1, chemin du Berger, 57380 MAINVILLERS

Atingebla lunde, marde kaj ĵaŭde inter la 20-a kaj la 20-a30

Telefona : 03 87 01 00 39

Rete : [jacques.herle@laposte.net](mailto:jacques.herle@laposte.net)



Ĉareto por transporti la ekspozicio-panelojn



## Aliĝilo por la 69a Regiona Staĝo de Esperanto en Ban sur Meurthe Clefcy la 1/2/3ajn de aprilo 2011

S-ro S-ino	Familia nomo	Persona nomo	Aĝo, majpli ol 18 aŭ studento	Aliĝ-kotizo	Elektita kurso
1	ĉef-aliĝanto				
2	kun-aliĝantoj				
3					
4					
Adreso					

Mi preferas, ke mia adreso ne aperu en la dokumentoj disdonataj dum la staĝo (signu)

Telefono: \_\_\_\_\_ Ret-adreso: \_\_\_\_\_

Mi pagas (minimume la aliĝkoton) jenan sumon: € \_\_\_\_\_  
al Simone CAJELOT per ĉeko  per ĝiro  per internacia ĝiro   
al nia peranto en Germanio   
Krom grava evento, la aliĝkoto ne estas repagebla.

Mi deziras ricevi mapeton por helpi la alvenon al la staĝo (krucumu)

R e z e r v a d o					
Nombro da manĝoj kaj tranoktadoj	Vendrede	Sabate	Dimanĉe		
Tagmanĝo		16	17		
Vespermanĝo		13	14		
Personoj en simpla ĉambro + maten-manĝo					
Personoj en komforta ĉambro + maten-manĝo (limigita nombro)					
Personoj en hotel-komforta ĉambro + maten-manĝo					
Ĉambro-prefero	1-lita	2-lita	plur-lita		

## Provizora Programo:

### Vendrede 1an de aprilo 2011

- 17a Akcepto de la unuaj alvenantoj
  - 19a30 Vespermanĝo
  - 20a Turismado en Albanio
  - 21a Bildoj pri Kubo
  - 21a45 Knajpo malfermita.
- ### Sabate 2an de aprilo 2011
- 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo
  - 9a30 Turismado: forveturado al Le Val-tin, ĉarma vilaĝeto, vizito al bombonejo.
  - 10a30 Forio tra Plainfaing, Fraize, vizito al sekojo ĉe laĝeto
  - 12a Reveno al Le Vic
  - 12a30 Tagmanĝo
  - 13a30/14a30 Akcepto de alvenantoj
  - 14a/14a30 Prezentado de la novaĵ libroj de la libroservo
  - 14a30/18a Kursoj C, D kaj E.

Prelego : Bardhyl SELIMI

- 18a30 ĝis 19a30 Gustumado de kulturaĵoj faritaj per la kolektitaj plantoj
- 19a30 Vespermanĝo
- 20a30 FAMO kantos por ni !
- Poste knajpo

### Dimanĉe 3an de aprilo 2011

- 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30/12a Kursoj C, D kaj E
- 12a30 Tagmanĝo
- 13a30 Komitat-kunsideto
- 14a Vizito al muzeo en St-Dié
- Poste disigiĝo

La libroservo proponos siajn 680 titolojn dum la tuta staĝo

FaMo distros nin sabate vespere per kantado en Esperanto kaj en la franca. Li estas la baritono de la koruso Inter-Kant.

Bonvolu sendi la aliĝilon kaj vian antaŭpagon al :  
S-ino Simone CAJELOT  
4, route de la Beuré  
88230 FRAIZE

Ĉekoj kaj ĝiroj je la nomo de:

**Simone CAJELOT**

Naciaj ĝiroj al CCP 1 906 30 J NANCY

Internaciaj ĝiroj al

**Simone CAJELOT: IBAN:**

**FR21 2004 1010 1001 9063 0303 181**

**BIC: PSSTFRPPN**

**Por Germanio al nia peranto:**

je la nomo de: Hans-Dieter Platz.

(menciu la celon de via pago)

Poŝtirokonto:

918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA

Ludwigshafen.

## KURSOJ

**C: Progresantoj :**

paroliga kurso tute en esperanto.  
Gvidas Edmond Ludwig

**D: Seminario: Malkovro de Albanio**

Bardhyl SELIMI, albana esperantisto vaste konata tra la movado pro siaj mult-nombraj artikoloj en diversaj esperant-lingvaj gazetoj, konatigos nin kun Albanio, ties geografio, historio, lingvo, kulturo kaj nuntempa politika vivo survoje al Eŭropa Unio.

**E: Kolektado de plantoj**

Kun gvidado de fakulino, en la proksimeco, (kun tra-dukoj al Esperanto). Antaŭ-vidu solidajn ŝuojn kaj varmajn vestaĵojn. Revene kuirado kaj poste invito al gustumado por ĉiuj staĝanoj.

Pli poste, helpe de libroj, inter-saĝo de specifaj receptoj.





Funebras la klubo pro la forpaso de *Pierre Polnard*, malnova kaj fidela membro, kiu viktimiĝis je akcidento. Ĵus forlasintaj la urban "sanig-padon", li kaj la edzino estis faligitaj de veturilo.

"Petro" aktive enpartoprenis la agadon de la klubo, kaj aparte famiĝis pro la ellaborado de okulfrapa Eo-"ĉaro", okaze de la jaraj karnaval-festoj.

Kelkajn tagojn poste malaperis *Monique Lepage*, ankaŭ fidela klubanino. Apud esperanto ŝi dediĉis sian liberan tempon al la pentro-arto.

Niajn kompatajn kondolencojn al la du familioj.



L'Association Française des Cheminots pour l'Espéranto avec le concours de l'Union Artistique et Intellectuelle des Cheminots Français et Espéranto - Thionville

ORGANISENT LE 3ÈME STAGE  
DE LANGUE INTERNATIONALE ESPÉRANTO  
À NILVANGE (MOSELLE) DU 04 AU 08 AVRIL 2011

Au Foyer accueil du parc du château  
12 rue Joffre  
57240 NILVANGE  
Renseignements

Espéranto-Thionville

<http://www.esperanto-thionville.ass0.fr>

ou

Bernard VIVIER

25 Bd du Jura St-Nicolas-en-Forêt - 57700 HAYANGE



*Estimataj membroj,*

Okaze de la lasta komitatkunveno de UFE, kiu okazis la 3an de oktobro en la sidejo de nia asocio, mi estis elektita kiel *ĝenerala sekretario* por anstataŭigi *Raymonde Coquisard*.

Mi esperas plenumi la diversajn taskojn de mia nova posteno plej taŭge kiel eble.

Unu el tiuj taskoj estas plivivigi la internan komunikadon inter la membroj kaj la asocioj, ambaŭ direkten) kaj tiucele, mi atente restas je via disponeco.

Mi, kiel komputilisto, agnoskas la gravecon de interretaj kaj modernaj komunikiloj. Kaj mi klopodos, kadre de la komunikada komisiono, kunlaborante kun ĝiaj membroj, ĝisdatigi nian

retejon kiel montrofenestro de nia asocio.

Mi do fidus je ĉiuj membroj por informi min pri la ĝisdatigendaj informoj de nia retejo.

Antaŭdankon, plej elkore,

*Axel Rousseau*

Ĝenerala Sekretario

**esperanto**  
*France*

## Prelego de s-ro Miyoshi prezentita de Atilio en Espace 110 en Illzach

Estis planita por la 25a de novembro 2010 vizito de s-ro Etsuo Miyoshi kaj lia sekretario Atilio Orellana Rojas al la kulturdomo Espace 110 en Illzach. Fakte Illzach estis la lasta etapo de la prelegvojaĝo tra Francio de s-ro Miyoshi. Ĝi komenciĝis en Parizo kaj celis dekon da urboj tra Francio.

La temo de lia prelego estis "**Ĉu guto traboras la monton granitan ?**"

Bedaŭrinde s-ro Miyoshi suferis sanajn problemojn post sia prelego en Vannes. Tial estis decidite, ke li reflugu al Japanio kaj ke Atilio anstataŭu lin por la ceteraj etapoj.

Atilio alvenis en Mulhouse en la posttagmezo, tiam eblis unue viziti la Universitaton ĝuste, kiam okazas la Esperanto-kurso de Edmond, por renkonti la studentojn, la dekanon Yann Kerdiles kaj la profesoron Edmond Ludwig.



En la universitato



En Espace 110



En Espace 110 la prelego povis okazi en pli komforta salono "salle rencontre". Malgraŭ malfavora vetero venis dudeko da samideanoj por ĉeesti la prelegon. Atilio nome de Miyoshi skizis ties karieron en la firmao Swanly, kiu fabrikas gantojn kaj kreis specifajn artikolojn por handikapitoj, nome baston-valizoj. La sukceson en sia firmao, dank'al daŭra obstineco, s-ro Miyoshi deziras apliki al la lingva problemo per aperigo de reklam-paĝoj pri Esperanto en gravaj gazetoj. Li planis tutan paĝon por la 15a de decembro 2010 en "Le Monde" kaj petas la samideanojn reagi al ĝi en la franca lingvo. Multaj demandoj iris al Atilio-mem, kiu jam vojaĝis al pli ol 80 landoj kaj instruis Esperanton en dudeko da ili. La vespero finiĝis en restoracio. La postan tagon Atilio planis flugi al Nederlando por la malferma tago de la centra oficejo. Dimanĉe jam revenis al Japanio tra Parizo.

### NB el la redaktejo

Ni taksas valoron konigi al nia legataro la ĉi suban alvokon lanĉita de S-ro Miyoshi, pri kiu aludis Atilio Orellana dum sia prelego en Illzach ( vidu supre ), eĉ se jam flugis iom da tempo post la apero en *Le Monde* de la aludita anonco, al kiu estis siatempe petite reagi. La ĉi-suba teksto kuŝas en la revuo "Esperanto" de UEA, decembro 2010.



### Alvoko al franclingvanoj

**Ni ĉiuj konscias pri la granda influo, kiun amaskomunikiloj havas, kiom ŝlosiloj ili estas en la mondo ĝenerale. En nia kazo, pere de ilia voĉo la ekstera mondo ricevas informojn pri nia agado, pri nia kontribuo al la monda paco kaj nia engaĝiĝo pri lingvaj temoj. Gravus, do, ke ili komprenigu ankaŭ al EU la rolon de Esperanto.**

Mia agado en Francio estas informa por vekti tieajn amaskomunikilojn pri la EU-lingva problemo. Tiu lando estas ja grava, prestiĝa kaj potenca ne nur en EU, sed ankaŭ monskale. Ĝi estas, krome, influava, ĉar la franca estis konsiderata LA internacia lingvo. La voĉo de Francio estas plu aŭdata tra nia tuta planedo kun respekto.

Jam 8 jarojn mi aperigas anoncojn plurlande en Eŭropo, el kiuj 9-foje en Francio. Ili estas sub la rubriko "Reklamoj", sed mi deziras, ke Esperanto estu traktata kiel novaĵo. Dum mia lastjuna vizito al *Le Monde* oni sciigis al mi, ke por ke Esperanto estu novaĵo, la ĵurnalo devas konscii pri vera intereso en la publiko. Tion ili taksas père de reagoj de la legantoj.

La 15an de decembro en *Le Monde* denove aperos reklamo. Temos pri 2 paĝoj; sur unu aperas intervjuo kun la nepo de D-ro Zamenhof kaj sur la alia informoj pri Esperanto.


Lerninte, ke Ĝingis-Hano breĉis nur 5-metre la Grandan Muron por ĉevaloj kaj venkis Ĉinion dum palpebrumo, mi invitas vin agi same.

Jen, do, mia alvoko al vi, franclingvaj esperantistoj: post la apero de la 2-paĝa anonco, bv. Reagi al la redaktejo de *Le Monde* papere al: *Le Monde*, 80 Bd Auguste Blanqui, 75707 Paris Cedex 13, aŭ rete al [courrier-des-lecteurs@lemonde.fr](mailto:courrier-des-lecteurs@lemonde.fr). Invitu ankaŭ viajn familianojn kaj geamikojn agi same. Bv. skribi NUR franclingve kaj petu, ekzemple, informojn pri denaskulojn, Eŭropa lingva diverseco kaj Esperanto, ĉu daŭra EU-angliĝo taŭgas?, aperigo de pliaj informoj pri Esperanto, ĝia literaturo ktp. Ankaŭ kritikaj opiniojn bonvenas / bezonatas ( manko de Esperanto-kulturo, artefarita lingvo ne kompareblas kun nature evoluinta lingvo, malriĉaj esprimnuancoj ktp. ), ĉar nur pozitivaj leteroj estos tuj perceptataj kiel kampanjo.

Mi antaŭdankas vin pro via apogo.

Etsuo Miyoshi





## SAULXURES-surMOSELOTTE



Do nia grupeto ne komplete dormas.

Ekde la 2a de novembro, mi zorgas pri grupeto de 9 adoleskantoj en Saulxures. Mi esperas, ke tiuj pecetoj estas kelkaj pozitivaj gutoj.

... ni agadas ...

Malgrandaj rojetoj faras grandajn riverojn !

Nia Gérardmer- grupeto enhavas 8 membrojn, plus mi. Niaj renkontoj okazas ĉiun duan vendredon. Ni laboras en tradicia maniero: traduko de teksto komune legita, gramatika ekzerco aŭ invento de teksto laŭ bildoj.

Ni ne havas eksterordinarajn okazaĵojn por rakonti, krom ke junio ni faris belan migradon kaj piknikon kun pola esperantista paro *Grazina* kaj *Andrzej*, ke tuj poste ni organizis amikan tagon kun Germanoj en *Saulxures-Cornimont*, ke Simone rakontis pri Kubo kaj mi pri Pluezek.

Ginette MARTIN

## MULHOUSE Esperanto en la Universitato



Ankaŭ ĉi-jare ekfunkciis Esperanto-kurso en la *Fakultato pri Beletro, Lingvoj kaj Homaj Sciencoj* de la universitato de *Alta Elzaso* en *Mulhouse*. Ĝin sekvas deko da gestudentoj. Por la unua fojo ankaŭ sekvas la kurson studentinoj de aliaj fakultatoj.

Malgraŭ la senrezerva subteno de la dekanato, ne eblis funkciigi duagradan kurson pri literaturo, pro la malapero de la lastjaraj studentinoj laborantaj profesie aŭ studentaj eksterlande.

Edmond LUDWIG

## STRASBOURG

Interesa ret-paĝo vizitinda kun multaj sub-rubrikoj. Kiel en pluraj kluboj proponiĝas semajnaj lingvo-kursoj ( 2 niveloj ).

Interesaj programeroj : mardon la 7an de decembro, 19a/20a30, invito enpartopreni specifan vesperon en la kadro de *SMILE (Strasbourg Metropole InternationaLE)*, sub formo de "*lingva aperitivo*", kun rezervita tablo por gastoj esperanto-parolantaj. Sabaton, 11an de decembro, ek de la 15a, en *Village-Neuf*, esperanto-festo de la " trilandimaj " regionoj.

Notindas ankaŭ kulturaj vesperoj, renkontoj, promoci-agadoj punktaj, fak-gazet-arkivaĵoj, ampleksa mediateko.

Esperanto-Strasburgo disponas profilon sur *Facebook* kaj pefadenoj, per *Twitter*.

## SAINT-DIZIER

Kiel ĉiujare, la urba klubo "*Léo Lagrange*" proponas sine de ampleksa kultur-programo, lingvo-kursojn inter kiuj esperanto. Nelaciĝebla samideano Claude Jourde prizorgas ĝin ĉiusemajne.

Ankaŭ prozelito de la internacia lingvo, li prezentis ĝin antaŭnelonge al interesatoj, en la tiel nomata "*Base aérienne 113 St-Dizier-Robinson*". Nova prelego estas samloke antaŭvidita.


### ESPERANTO

Responsable : Claude Jourde

Seule langue construite pour permettre une communication internationale équilibrée. Cette langue, parlée dans 120 pays sur tous les continents est d'un accès facile, de par sa régularité et la formation de son vocabulaire par racines et axes. Elle permet des contacts interculturels respectueux.

> Mardi - 18h/20h





# Akademio de Esperanto



43 akademianoj voĉdonis por elekti la estraron kaj la direktorojn de la *Sekcioj kaj Komisionoj* de la Akademio de Esperanto.


Kiel estraranoj estis elektitaj:

John Wells, *prezidanto*  
Probal Dasgupta, *vicprezidanto*  
Brian Moon, *vicprezidanto*  
Renato Corsetti, *sekretario*

Kiel direktoroj estis elektitaj:

Christer Kiselman, *Faka Lingvo*  
Otto Prytz, *Gramatiko*  
Bertilo Wennergren, *Ĝenerala Vortaro*  
Marc Bavant, *Kontrolado de lerniloj*  
Alexander Shlafer, *Lingva Konsultejo*  
Paul Gubbins, *Literaturo*  
Probal Dasgupta, *Prononco*  
Carlo Minnaja, *Komisiono Historio de AdE*

laŭ [ Oficialaj Informoj de AdE ], n-ro 14, 2010-10-16



16-minuta filmo kun scenoj el la *aŭkcio de la 95-a UK* en Havano videblas nun en la Reta Kinejo de UEA

<http://www.ipernity.com/doc/97850/9550744>

## TUTMONDA PREMIERO EN LA ESPERANTO-MOVADO

Okazos dum la **Universala Kongreso 2011** en Kopenhago, Danlando, la

== UNUA SESIO DE EKZAMENOJ POR BLINDULOJ ==

( ekzameno pri lingvokono )

**Vidkapabluloj... Bonvolu plu legi!!**

Du tre kompletaj kaj precizaj regularoj troviĝas sur la retpaĝo de

[www.edukado.net](http://www.edukado.net) - ekzamenoj - ILEI UEA - ekzamenoj por blinduloj.

[www.ilei.info](http://www.ilei.info) - agado - ekzamenoj - ILEI UEA - ekzamenoj por blinduloj

Interesatoj bonvolu anonci sin ĉe la prezidanto de **Internacia Ekzamena Komisiono**, Mirejo Grosjean, Svislando, ĝis la 31a de majo 2011, uzante la retadreson [mirejo.mireille@gmail.com](mailto:mirejo.mireille@gmail.com), aŭ telefone per +41 32 932 18 88, indikante vian kompletan nomon, devenlandon kaj aĝon.

Al ĉiuj vidkapabluloj : bv transdoni tiun informon al la blinduloj en via urbo, en via lando, en via landa asocio, en via regiono.

Mirejo Grosjean, prezidanto de Internacia Ekzamena Komisiono, Svislando.  
Les Brenets, la 5an de decembro 2010

Mireille Grosjean, Grand-rue 9 cp 9  
2416 LES BRENETS Suisse / Svislando

<http://mirejo3.blogspot.com>  
Appel à la PAIX mondiale sur  
[www.alvoko-al-mondpaco.org](http://www.alvoko-al-mondpaco.org)

+41 (0)32 932 18 88 domicile / hejma kun respondilo

+41 (0)79 69 709 66 cellulaire / portebla



Dancas Ko Kyun Ja el Koreio

vespero, la unua okazis sabate la 2-an.

Jaŭde la 7-an la programo disvolviĝis jene:

Antaŭtagmeze la prelego de s-ro Antonio Marco Botella pri: "Centjara datreveno de la granda poeto, Miguel Hernandez. Miguel HER-

NÁNDEZ (naskiĝis la 30-an de oktobro 1910 en Orihuela, urbo en la provinco de Alikanto (Hispanio), kaj forpasis la 28-an de marto 1942 en Alikanto). Li estis unu el la plej gravaj poetoj de la unua duono de la 20-a jarcento en la hispana lingvo.

Post la fino de la milito, li klopodis ekziliĝi, kaj provis rifuĝi en Portugalio. La reĝimo de Salazar revenigis lin en la brakojn de la polico de Franco. Li estis enkarcerigita, kaj tie li suferis je tuberkulozo. Li mortis 31-jara en prizono.

La prelego de la paro s-ro Hubert Demeyer kaj s-ino Michèle Villers, pri la historio de Belgio estis interesa.

Sekvis la prelego de la paro el Sud-Koreio, s-ino Ko Kyun Ja kaj s-ro An Jong Soo. Ili prezentis: folklorajn koreajn kantojn, kaj parolis pri: Solidareco de Esperanto.

Fine ni ĝuis la vesperon, kiun animis la grupo "Montjuic", kun trinkado de "cremat" (rumo bruligita kun kafo kaj aliaj spicaĵoj). Estis ankaŭ ebleco danci por tiuj kiuj ŝatis.

Vendrede, la lastan tagon de la 18-a semajno, okazis la duon-taga ekskurso al la fondaĵo "Apel-les" kaj ties muzeo. Okazis ankaŭ malkovro de memortabulo, pri la E-semajno, ĉe la urbodomo de El Vendrell kun la ĉeesto de la urbestro: s-ro Benet Jané i Palau.

Posttagmeze, S-ro Wolfgang Günther prezentis sian verkon, "Kiosko de Levante". Lia verko estas kvazaŭ almanako en kiu kunlaboras gesamideanoj el la tuta mondo.


Vespere okazis debato pri la pasinta semajno, kaj tiel finiĝis la 18-a internacia Esperanto-semajno. Kompreneble, dum la tuta semajno, ĉiuj estis liberaj, ĉu libere viziti la urbon, ĉu promeni ĉe la marbordo, ĉu partopreni la proponitan programon, tio laŭplaĉe.

Artaĵoj de Miguel Hernandez



Prelegas Wolfgang Günther

DE LA 2 - a ĜIS LA 9 - a



Memortabulo inaŭgurita ĉe la urbodomo de Vendrell



Fotoj: Rémy kaj Andreo

Rémy BOUCHET



La filmo rakontas la vidatestantaj raportojn de krimo apud Kioto en la 12-a jarcento.

Marde, la tuta mateno estis dediĉita al la vizito de la domo de Pau Casals, kiu iĝis muzeo, en San Salvador (Ĉirkaŭo de Coma-Ruga). Pau Casals estis fama hispana violonĉelisto, orkestro-gvidanto kaj komponisto. Li naskiĝis en El Vendrell (Komunumo al kiu leĝe apartenas Coma-Ruga), la 29-an de decembro 1876 kaj mortis 96-jaraĝa en San Juan de Porto Rico la 22-an de oktobro 1973. Ekde la reveno de la demokratio en Hispanio, li ripozas en sia naskiĝurbo El Vendrell. Post la vizito, ni aŭskultis, en la aŭditorio Pau Casals, mallongan piano-koncerton far Jordi Pell Soldevila.




Domo kaj muzeo de Pau Casals

Posttagmeze okazis disdono de la premio "Ada Sikorska-Fighiera" al s-ino Maria Rafaela Urueña Álvarez. La premio celas publike agnoski gravan kaj sindediĉan laboron por la bela ideo de esperantismo farita de meritplena vivanta esperantist(in)o en kiu ajn loko de la mondo.



Vespere ni spektis la filmon de la opero "La Bohème" (la bohemo-vivo). La Bohème estas opero komponita de Giacomo Puccini el Italio. Prezentis la filmon, s-ino Maria Ferigle.



Monaĥejo Monserrat

Merkrede sin anoncis bela vetero, despli feliĉe ĉar la tago celis tuttagan ekskurson al la monaĥejo Monserrat.

Montserrat (la *segita monto*) estas sabloŝtona montaro en Katalunio proksime de la urbo Barcelono. Piede de la orienta montopinto troviĝas fama benediktana monaĥejo, kiu ankaŭ nomiĝas Montserrat.

De la monaĥejo, kiu troviĝas je alteco de 720 metroj super marnivelo, pluraj vojoj gvidas al la plej alta pinto, la monto

*Sant Jeroni*, kiu altas 1.236 metrojn.

Ekzistas indicoj pri la ĉeesto de ermitoj ekde la 8-a jarcento. Tamen la unuaj firmaj novaĵoj datiĝas de la 9-a jarcento. Poste dokumentoj atestas pri 4 ermitejoj el kiuj unu estis dediĉita al la Dipatrino, sub la nomo Sankta-Maria. Dum la unua triono de la 11-a jarcento, abato "Oliba" starigas malgrandan monaĥejon apud la ermitejo de Sankta-Maria. Baldaŭ la monaĥejo fariĝas pli kaj pli fama. Ĝi estas ankoraŭ nun grava pilgrimo-loko en Hispanio.



Ĉu vere Serano estas muzikisto

Post la vizito de la monaĥejo, revenvoje, ni vizitis agrokulturan kooperativon, kiu produktas ĉefe vinon, sed laŭ iom industria metodo. Produkto-metodo kiu al mi, franco, tute ne plaĉas, sed ili vere produktas vinon je nur baza kvalito, ĉiutaga ĉetabla vino. En la sama urbeto, Vila-Rodona, ni haltis ĉe la strato Esperanto "CARRER ESPERANTO" (laŭ la loka lingvo).

Reveninte, vespere okazis la dua interkona



Okaze de dua interkona vespero

# LA 18-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE KULTURO KAJ TURISMO EN COMARUGA, de la 2a ĝis la 9a de oktobro 2010



Ĉe la bordo de la maro Mediteraneo, kelkdekoj da kilometroj sude de Barcelono (Hispanio), situas la urbeto Coma-Ruga (Komaruga). Urbeto, kiu el apudmara vilaĝo; kies enloĝantoj estis fiŝkaptistoj, fariĝis moderna turisma urbeto ĉe bordo de la maro, ĉefe por turistoj kiuj ŝatas farnienton, banadon kaj sunbruniĝon.

En tiu urbeto staras multe da hoteloj kun la plej multaj fermitaj ekster somero, el kiuj estas tri-stela hotelo "NATURA PARK", kiu, la 2-an de oktobro, akceptis la 18-an Internacian Esperanto-semajnon de kulturo kaj turismo.

El dek landoj, sed ĉefe el Hispanio kaj la najbara Francio, aliĝis ĉirkaŭ 130 Esperantistoj.

Ĉiutage, dum la tuta semajno,

okazis E-kurso por komencantoj, gvidita de Stano Marček, el Slovakio, per rekta metodo.

Dimanĉe, la 3-an, okazis sole-na inaŭguro kun la reprezentanto de la urbestro pri la kulturo kaj turismo.

Posttagmeze, s-ro Gian Carlo Fighiera prelegis pri noveloj de Boccaccio. La itala verkisto Giovanni BOCCACCIO [ĝovani bokaĉo] naskiĝis la 16-an de junio 1313 aŭ en Florenco aŭ en Certaldo (ne estas firma certeco) apud Florenco. Li mortis la 21-an de decembro 1375 en Certaldo.

Giovanni Boccaccio, kiu verkis itallingve kaj latine, estis la majstro de la novelo. Lia Dekameron - kolektaĵo de noveloj ligitaj per kadra rakonto - esence influis la eŭropan literaturon kaj nuntempe estas konsiderata kiel unu el la plej gravaj verkoj de la tutmonda literaturo.

Lunde matene, la 4-an, Renato Corsetti prelegis pri la temo: "POR KE LINGVO ESTU TUTMONDA NE SUFIĈAS PAROLI ĜIN EŬROPE".

Posttagmeze, S-ino Anna Löwenstein prelegis pri: "Romo antaŭ 2000 jaroj".

Sekvis prelego de Gian Carlo Fighiera pri la japana filmo: "Rashōmon", (la kvar veroj). Rashōmon (japane 羅生門), esperante Raŝomon, estas japana filmo el la jaro 1950 de Akira Kurosawa, laŭ la novelo de Ryunosuke Akutagawa.



Floreal sukcesas trinki tiun dolĉan vinon el la speciala botelo "bota"



Inaŭguro kun reprezentanto de la urbestro de Vendrell





## China familio vizitas Alzaco

**Kunteksto** : Anne VERNET, membro de la Esperanto-klubo de Village-Neuf, en la suda sektoro de Alzaco, nomata "Sundgau", pasigis jarkomence kelke da tempo en Tajvano, renkontinte tie geesperantistojn.

Pro tiuj rilatoj, oni postulis, ke ŝi zorgu pri ĉina familio alvenonta en Strasburgo.

Temas pri la familio de Profesoro ZHENG Bo-cheng, kies filino trapasis sukcese doktoriĝan ekzamenon pri Ĥemio en la Universitato de Strasburgo. Ŝi ricevis plenan sukceson kaj ni gratulas ŝin denove. Gesinjoroj Zheng estis venintaj en Francion por ĉeesti la ekzamen-provon. Akompanis la filinon ankaŭ ŝia edzo. (se mi bone komprenis : ili renkontis unu la alian en Avinjono !). Ene de tiu kvaropo (la gepatroj kaj la studentino kun sia edzo) parolis esperante nur Profesoro Zheng.

**Riquewih** : Helpe de sia samklubano Bertrand WICK, Anne vizitigis al la familio Zheng la famkonatan vinberan vilaĝon "Riquewih" kies mezepokaj remparoj kaj



turoj same kiel la belaj tipaj domoj rimarkindas.

Tiu vilaĝo konsistigas turisman celon, ĉar ĝi resumas multajn trajtojn de nia regiono, precipe pri la domoj, kutimoj de la vin-kultivistoj, kaj ĝenerale ties kulturo.

**Colmar** : Poste la familio Zheng kun siaj du akompanantoj vizitis la urbon Colmar. Pro la malmultaj horoj disponeblaj, eblis efektiviĝi nur per piedan viziton de la historia centro.



Tamen, ene de tiu limigita tempo, ni povis malkovrigi al la vizitantoj plurajn vidindaĵojn, inkluzive la muzeon "**Unter den Linden**" \* (Kio signifas "sub la tilioj" kaj fakte estas tiaj arboj fronte al la muzeo, antikva monaĥejo, kiu prezentas pentraĵojn

de la renesanca periodo, el kiuj elstaras la fama "Retablo de Issenheim" pentrita de Matthias GRÜNEWALD.)

Poste, videblis la fama renesanca "**Domo de la Kapoj**" [Maison des Têtes],

La katedralo, kun ĝiaj belegaj ŝtonoj el grejso ruĝa kaj flava, la "**Domo Pfister**" [Maison Pfister], la "**Strato de la Vendistoj**" [Rue des Marchands], la "**Malnova Doganejo**" [le "Koifhus"], la **Kajo de la fiŝ-vendistoj** [quai des Poissonniers] kun kelkaj bunte pentritaj domfasadoj laŭlonge de la rivereto "Lauch", kiun uzis la terkultivistoj por provizi la bazaron pri legomoj per boatoj. Kaj la vizito finiĝis ĉe la tro (!) fama poŝt-kart-aspekta loko, ĉe la ponto de la "**Malgranda Venecio** [la Petite Venise].

La vizito kun klarigoj en la franca kaj en esperanto (tradukitaj en la ĉinan por la patrino) disvolviĝis en gaja




etoso, eble miksitaj de surprizoj por niaj vizitantoj.

La vespero en Colmar finiĝis per komuna manĝo en tiea restoracio. Ĉu la alzaca gastronomio plaĉis al niaj ĉinaj amikoj, kies lando estas fama pro la riĉeco kaj abundo de kuir-receptoj ? Ni deziras tion !

Post gaja vespermanĝo kun membroj de Mulhouse-Espéranto, la familia kvaropo revenis al Strasburgo.

Pierre GROLLEMUND.





## Tajvano

Fine de 2009 kaj komence de 2010 Anne Vernet estis en Tajvano por lerni la ĉinan lingvon kaj ankaŭ por renkonti esperantistojn. Ŝi proponas rakonti al vi pri sia vojaĝo kaj restado sur tiu insulo. Ni varme dankas al ŝi pro tiu ege interesa raporto. *Andreo*



### Tajvano mallonge

La insulo troviĝas sud-oriente de la kontinenta Ĉinio Ĝi longas 394 km de la Nordo al Sudo kaj larĝas 144 km de okcidente al oriente.

Areo : 36 200 km<sup>2</sup> (kun proksimaj insuletoj)

<b>Oficiala nomo</b>	Respubliko Ĉinio (antaŭe nomita Formozo, nomo donita de la portugaloj) Tajvano estas libera kaj demokrata lando, sed tamen nur kelkaj malgrandaj landoj agnoskas ĝin kiel memstara lando, kaj Tajvano ne estas membrolando de Unuiĝintaj Nacioj.
<b>Popolo</b>	23 milionoj da loĝantoj (2009)
<b>Etnaj popoloj</b>	La loĝantoj konsistas el 98% ĉinoj kaj 2% prainsulidoj. Inter la ĉinaj loĝantoj estas la hokoj (=Minnan) (70%), la hakaoj (15%), la kontinentanoj (aŭ eksterprovincanoj) (13%). La hokoj kaj la hakaoj estas posteuloj de enmigrantoj, kiuj venis el suda Ĉinio inter la 17a kaj la 19a jarcentoj. La kontinentanoj venis al Tajvano kun la trupo kaj registaro post la dua mondmilito. La indiĝenaj insulidoj konsistas el 14 oficiale agnoskitaj etnoj. La nomo "aborigeno", aŭ montara popolo ŝajnas esti tabuo aŭ insulto. Ekde 1980 ili akceptas la nomon de "originalaj loĝantoj de Tajvano".
<b>Politika sistemo</b>	multpartia demokratio – Prezidento : Ma Ying-jeou
<b>Ĉefurbo</b>	Tajpeo (Taipei)
<b>Aliaj grandaj urboj</b>	Kaohsiung, Taichung, Tainan, Keelung
<b>Mono</b>	Tajvana dolaro (TWD)
<b>Oficiala lingvo</b>	mandarena ĉina, kun tradiciaj ideogramoj (en la kontinenta Ĉinio, multe da ideogramoj estis simpligitaj en la deksejaj jaroj)
<b>Aliaj parolataj lingvoj</b>	la hokla (ofte nomata ankaŭ "tajvana"), hakaa (la hokla kaj la hakaa estas sud-ĉinaj lingvoj), aborigenaj lingvoj, angla, japana
<b>Religiano kaj kred-sistemoj</b>	Budaismo, taoismo, I-Kuan Tao, adorado al la mar-diino (Mazu) kaj al diversaj aliaj dioj, kristanismo...
<b>Historio</b>	Unue kaj de tre longtempe vivis tie indiĝenaj popoloj. Antaŭ 17a jarcento loĝis jam bonhavaj ĉinoj (eble pli ol dek milionoj), kiuj libere laboris kaj vivis ne sub iu registaro. En 17a jarcento alvenis nederlandanoj kaj hispanoj, sed en 1662 ĉina generalo Koksingo (kun sia marista trupo forpelis ilin (nederlandanojn kaj hispanojn). Koksingo venigis multe da ĉinoj el Ĉinio al Tajvano kaj registris ilin. Li volis de Tajvano reveni al Ĉinio kaj restarigi Ming-dinastion (kontraŭ la Ĉing), sed tiu plano ne sukcesis. (Same kiel en la 20a jarcento Ĉiang Kajĉek volis reveni de Tajvano al Ĉinio). La kolonio de Koksingo kaj ties posteuloj daŭris nur dekojn da jaroj, ĉar la nova Ĉina Imperio okupis Tajvanon kaj faris el ĝi oficialan parton de Ĉinio. 1885 - Tajvano estis cedita al Japanio laŭ la kontrakto inter Ĉinio kaj Japanio post la malvenko de Ĉin-japana milito. Japanoj okupis Tajvanon por 50 jaroj ĝis fino de la dua mondmilito. 1945 : rekunigita kun Ĉinio, post la malvenko de la Japanoj en la 2a mondmilito 1949 : La ĉina registaro de Respubliko de Ĉinio (kreita en 1911, ĉe la fino de la ĉina imperio) kies ĉefo estis Ĉang Kajĉek instaligis en Tajvano post la malvenko kontraŭ Mao Zedongo, sekvita de unu miliono da ĉinoj el tuta kontinenta Ĉinio. 1996 : unua prezidenta baloto, post kelkaj malfacila jaroj de milita leĝo
<b>Geografio</b>	La plej granda parto de la insulo konsistas el montaro (275 montopintoj pli altas ol 3000 m). La plej alta monto nomiĝas Jada Monto ( <i>Yü Shan</i> ) (3952 m). Dank'al la diversaj medioj, la natura havaĵo tre riĉas : 500 specioj da birdoj, 3000 specioj da fiŝoj, 400 specioj da papilioj, 80 specioj da mambestoj, 3500 specioj da florphantoj...
<b>Ekonomio</b>	Terkulturado, fiŝkaptado kaj fiŝbredado. Tajvano estas fama industria lando pri ŝtalo, ŝipkonstruado, komputiloj kaj kromaj komputil-artikloj.
<b>Nasko-kvanto</b>	inter la plej malaltaj en la mondo (tio estas grava socia problemoj)

**Mia alveno**

Mi alvenis al Tajvano la tagon antaŭ Kristnasko. La aviadilo alteriĝis frumatene en Tajpeo, kaj de Tajpeo al Tajnano mi spertis la tiean rapideg-trajnon. Mi tuj malkovris mian ĉambron en la universitata loĝejo, kaj vespere mi festis kristnaskon kun alzata amiko kaj lia tajvana edzino; ili ĵus feris ĉe liaj bo-gepatroj apud Tajnano, kaj tie ni festis kun bongustega ĉina fonduo.

**Tajnano (Tainan) / Tajvano**

Tainan kuŝas en la ebenaĵo ĉe la okcidenta marbordo, 300 km sude de Tajpeo. Ĝi estas la 4a urbo de Tajvano, enloĝas preskaŭ 800 000 homoj. Kompare kun mia vilaĝo, ĝi estas tre granda kaj brua urbo; skoteroj multegas. Por veturi mi havis la bonan ideon aĉeti jam ekuzitan biciklon.

Tajnano estas la antaŭa ĉefurbo kaj nun ankoraŭ en ĝi ege etosas la tradicia tajvana kulturo. Tion atestas la multaj mirindaj buntaj temploj (oni diras 300!).

Ĉiu-stratangule troviĝas 7/11, etaj komercoj kie troviĝas necesaj (manĝaĵoj, gazetoj, tualetaĵoj, telefonkarto...) malfermitaj tagnocte kaj senescepte ĉiutage de la jaro.

La vetero estas tropika; la insulon transiras la tropiko de la Kankro. La vintra vetero en Tajnano estas bona, 15° - 20°C; sed ne estas hejtado! Varmega estas la somera vetero.

Ĉiam eknoktiĝas ĉirkaŭ la 18a. Neniam estas longa hela vespero kiel ĉe ni en somero!

Tajvano estas relative sekura lando; la plej gravaj riskoj estas tertremo kaj tajfuno en somero. Etan tertremon mi eĉ spertis dum mia restado. Tio ĉiam estas stranga sperto.

**La universitato**

Mi aliĝis al la 2-monata vintra kurso en la ĉinlingva centro de la fama universitato de Tajnan, la *Nacia Cheng-Kung Universitato* (NCKU). Cheng-Kung (Cheng-gong) estas la alia nomo de la tajvana heroo Koxing (vidu Historio).

Tie, mi renkontis gelernantojn pri la ĉina lingvo el



la tuta mondo, junaj kaj malpli junaj. Mi tre ŝatis la internacian etoson. Ankaŭ estis kelkaj aliaj studentoj el Francio. La deĵorantoj de la ĉina lingvcentro estis tre afablaj kaj tre helpemaj pri ajna problemo. Feliĉe, ĉar ekzemple kiam mi bezonis konsulti dentiston, mi estis kontenta, ke ili rekomendis al mi iun.

Semajne, mi havis 10 horan individuan lingvokurson (2 instruistinoj), kaj plie mi devis elekti 5 kromajn

kursojn (kaligrafio, gramatiko, konversacio...) Mi devis alkutimiĝi al la tradici-aŭtentikaj ideogramoj. Ĉar en Tajvano la ideogramoj ne estis simpligitaj kiel en Popola Ĉinio. Ne estas facile enkapigi la ideogram-skribomanieron! Unu instruistino ĉiam parolis tre rapide, kaj mi malfacile komprenis; sed la alia parolis malrapide kaj klare, kaj ni vere povis diskuti pri diversaj temoj. Ili preskaŭ neniam parolis la anglan; ili diris ke ili ne bone parolas ĝin.

Mi havis relative multe da hejmtaskoj. Mi ofte laboris en la tre silenta stud-lernejo, kelkfoje ĝis la fermo je la 11a nokte (ĝi estas la plej granda universitata biblioteko de Tajvan-sudo).

La parko de la universitato estas tre agrabla. En la ombro de la mirindaj egaj banjan-arboj ofte oni vidas praktikantojn de tajĝĉuan aŭ ĉikong, sole aŭ grupe.

Pri la instrua sistemo, por la plenkreskuloj, kiuj delonge forlasis la lernejon kaj tie lernas hodie, estas pli malpli facile alkutimiĝi al la notoj, hejmtaskoj, ekzamenoj ktp... La universitato estas ankaŭ tre rigora pri la ĉeesto en la kursoj, ĉar se vi bezonas daŭrigi vian student-vizon (2 monatoj baze), vi devas atesti vian partoprenon de almenaŭ 15 horoj semajne.

Male al mia sperto dum restado en Ĉinio, la tajvanaj studentoj ne tro emas diskuti kun la studentoj el eksterlando. Eble pro la fakto, ke en Ĉinio mi estis en lingvo-universitato.

Kompreneble miaj profesoroj aŭdis de mi pri Esperanto (*mondlingvo* en la ĉina). Ŝajnas ke ili por la unua fojo aŭdis pri la zamenhofa internacia lingvo.

**Mia renkonto kun esperantistoj : Tajvana Zamenhof-festo**

Antaŭ mia alveno, mi kompreneble serĉis pri Esperanto en Tajvano kaj trovis la adreson de Reza Kheir-Khah, en Pingtung. Estis bona surprizo kiam mi vidis sur la mapo ke Pingtung kaj Tajnan ne; de Tajnano la trajna vojaĝo daŭras iom pli ol unu horon.

Reza estas irana esperantisto, kiu edziĝis al Tajvanino. Ili loĝas ekde la jaro 2000 en Pingtung en la suda parto de la insulo kun sia tre gracia filino 9-jara Ailin.

Reza instruas profesie la anglan, sed ankaŭ Esperanton, kiun li kore strebas diskonigi. Li estas esperantisto de tre longe kaj tre bone konas la esperantistan movadon.

La esperantistoj ankoraŭ ne tre multas kvankam Tajvana Asocio de Esperanto jam ekzistis en 1925.

Kelkaj tagoj post mia alveno, Reza invitis min por la malfrua tajvana Zamenhofa festo, kiu okazis sabate la 2an de januaro en Pingtung. Mia unua Zamenhof-festo! Li petis min prepari prelegeton. Pri kio? Alzaco ŝajnis al mi interesa temo, do mi parolis pri Alzaco kaj



alzacaj turismaj Esperanto-projektoj, kaj Abengo tradukis al la ĉina. La festo komenciĝis kun la Esperanto-himno, kaj krom prelegoj ankaŭ estis muziko, kukoj...

La renkonto estis tre amika kaj tre bone organizita. Estis tre internacia, kun partoprenantoj el Tajvano, Irano, Belgio, Italio, Francio, Usono... Oni povis aŭdi Esperanton, la ĉinan, la anglan, la francan..., kaj la lingvoj intermiksiĝis en mia kapo...

Estis bona okazo por renkonti novajn amikojn.

### Aliaj spertoj : tajĝičuan, pied-masaĝo...

Ĉiu-matene mi partoprenis tajĝičuan-kurson (37-movado-stiloj) en la parko apud mia loĝejo. Mi tre ŝatis la matenan etoson en la parkoj, kun multaj personoj trejnantaj la korpon kaj la "ĉi". Tio estas por mi vivanta ĉina kulturo, kiu esprimiĝas korpomoviĝe.

Mi plurfoje ricevis piedmasaĝadon; tio povas esti



tre doloriga, sed oni diras ke tio tre bonas por la sano kaj la energi-fluo. Ankaŭ rimarkindas la fakto, ke la masaĝisto povas senti sur la piedoj la korpajn problemojn.

Antaŭ la piedmasaĝo, dum la piedbano, la masaĝisto masaĝas la ŝultrojn kaj la nukon. Mirige, la homo, kiu popularigis la piedmasaĝon en Tajvano estas svislanda fratulo kristana, kiu de longtempe loĝas en Tajvano. Li spertis la malaperon de lia sanproblemo dank'al piedmasaĝo, kaj li estis tiel kontenta, ke li decidis ekterni, kaj poste instrui la metodon.

La pied-masaĝoj estiĝis bonaj okazoj paroli la ĉinan. Ne miru kiam oni demandas al vi pri via aĝo, geedza stato aŭ pri via salajro. Male al nia kulturo, tiel



estas la unuaj tieaj ekinterkonatigaj demandoj.

Mi ne volis forlasi la insulon sen viziti la Esperanto-piedmasaĝ-centron en Pingtung, kiun estras Kevin, aktiva ano de la loka Esperanto-grupo. Ĝi probable estas la nura Esperanto-masaĝejo en la tuta mondo !

Se iam vi vizitos Tajvanon, ne forgesu viziti ĝin, ĉar tie vi estos tutcerte bonvenaj. Kevin kaj liaj kolegoj estos kontentegaj akcepti vin esperantlingve.



Ankoraŭ interesa sperto : iun sabaton mi promenis en la urbo, kaj tute hazarde mi trafis bazaron pri ekokultivaj produktoj! (fake mi estas agronomino kaj de ĉiam interesiĝis pri ekokultivo). Ekokultivo en Tajvano pli kaj pli popularas. Inter alie tie estis stando pri enkonduka kurso pri tradicia ĉina medicino en la universitato (mi interesiĝas ankaŭ pri tio), kaj ili invitis min por la samtaga vesperkurso; bedaŭrinde mi preskaŭ nenion komprenis, nur kelkajn vortojn. Sed tamen mi estis tre kontenta !

La tajnana kuirarto tre famas. La tajnanoj ege fieras pri ĝi kaj ili ĉiam emas ĝin malkovrigi al la eksterlandanoj. Tajvano estas granda mondo-kuirejo. Tie oni povas gustumi la kuirarton de la diversaj regionoj de Ĉinio kaj ankaŭ de la tuta mondo.

La urbo Tajnan famas pro la krak-manĝaĵoj, kiujn oni aĉetas sur la strato. Dank'al mia tajĝičuan-instruistino mi malkovris la *danzi mian*, tajnanaj specialnudeloj. Kiel trinkaĵo estas la fama perl-teo : malvarma teo kun tapiokaj perloj, kiun oni aĉetas sur la strato kaj trinkas per pajlero.

Mi tre ŝatis la multegajn kaj malmultekostajn etajn manĝejojn. Sed mi ofte manĝis en memservejo, kie oni povas facile selekti la manĝaĵojn (pli facile ol sur ĉinlingva restoracia karto !). Feliĉe mi ŝatas rizon kaj al mi multe plaĉas manĝi per manĝ-bastonetoj.


### La tajvana kred-sistemo

Mi konstatis ke la tajvana kred-sistemo estas tre



vigla. La homoj iras al templo por preĝi, bruligi incenson, por peti la protekton aŭ la helpon de la ĉielo. Ŝajnas ke la diversaj ĉinaj tradicioj (budaismo, taoismo, konfucianismo) ofte miksiĝas.

Por eksterlandano kiel mi, ŝajnas ke mistera afero okazas en temploj : kion signifas tiuj du lunformaj lignaj pecoj, kiujn kredantoj jetas sur la plankon ? Fakte, tio



estas maniero por la hezitemaj homoj komuniki kun la dio(j) de la templo : du pecoj kun ronda flanko supre signifas ke la dio respondas *ne* ; la malo signifas *jes* ; kaj se estas unu supre kaj unu malsupre, tio signifas ke la demando estas malklara por la dio kaj postulas pliajn informojn.

Alia kred-afero : En iuj tagoj (laŭ la tradicia kalendaro) antaŭ komercoj sur la strato oni vidas fajron en kaldrono kaj belaspektajn oferdonojn (kokidoj, fruktoj, trinkaĵoj... ) por la dioj. Petardoj ofte sonoras, por forigi la malbonajn spiritojn.

Ankaŭ la rilato kun la mortintaj pragepatroj estas grava. Ĉiuj loĝejoj havas pragepatran altaron. Laŭ ilia ankoraŭ vigla tradicio, gefiloj devas zorgi pri siaj gepatroj. Ekzemple demando de mia profesoro, kiam mi parolis pri mia familio (mi kaj miaj gefratoj loĝas for de miaj gepatroj) : *kiu zorgos pri viaj gepatroj, kiam ili estos tre maljunaj kaj bezonos helpon ?* Tio estas la konfucea tradicio.

### Ĉina novjarfesto

Ĉi-jare ĝi okazis la 18-an de februaro, kiam komenciĝis la jaro de la tigro. Ĝi estas la plej grava festo de la jaro, kun multaj tradiciaj ritoj. Ĝi iomete similas nian Kristnasko-feston.

Dum unu tuta semajno ĉiuj aktivaĵoj de la lando ĉesas, la infanoj kaj laborantoj ferias, ĉar ĉiuj familioj kunvenas kaj kune festas. Ekzistas multaj tradiciaj pladoj, ekzemple la *nian gao*, glueca kuko.

Io tre gravas: la *hong bao* (ruĝa koverto). Ruĝan koverton enhavanta monon donacas gepatroj, geavoj... al la infanoj; sed kiam gefiloj laboras, tiam ili siavice donacas koverton al la gepatroj. Tial mia profesoro diris al



mi : *De kiam mi laboras, mi ne plu tro ŝatas la novjaron.*

Ankaŭ la lingvo-centro estis fermita dum unu semajno. Do mi profitis libertempon por iri Hong-Kongen dum 3 tagoj, por viziti anglan amikinojn, kiun mi renkontis en Pekino antaŭ 5 jaroj.

Post mia reveno de Hongkong, la ĉinan novjarfeston ni esperante festis ĉe Reza. Ĉiuj okazoj oportunis por kunigi la samideanojn.

### Kelkaj memorindaj konatiĝoj

Ioane, estonta pastoro, el Tuvalu, insuleto en Pacifiko, kiu estas verŝajne la unua insulo, kiu malaperos pro altiĝo de la marnivelo. Ankoraŭ estas la tre afabla ĉin-lernando Edil, apenaŭ pli ol 30 jaroj, el Kirgizistano; kiam mi demandis al li pri lia profesio, li respondis: *mi estas demokrata, kaj estas politika rifuĝinto en Svedio.* Post mia reveno al Francio, kiam mi aŭdis pri revolucio en Kirgiztano (7a de aprilo), mi kompreneble tuj pensis pri li, kaj mi vere miris kiam mi eksciis ke li iĝis parolkomisiito de la provizora gubernio ! Por mi, li estas bela ekzemplo de sincera politika engaĝiĝo por la homaj rajtoj !

Fine, impresa koincido, pri Clement, amiko de amikino, kiun mi ne konis antaŭe (mi nur sciis, ke li estis en Tajvano por 1 jaro kun siaj edzino kaj filoj); kia surprizo kiam mi ricevis lian retpoŝto-respondon dirante, ke li kaj lia edzino laboris en la hospitalo de la tajnana universitato,... vidalvide al la lingvocentro ! Ni kelkfoje manĝis kune en la restoracio de la hospitalo.

### Ekskursoj

Mi ne havis multe da tempo por viziti la insulon. Mi bicikle vizitis kelkajn lokojn en la Tajnana urbo, ĝis la maro. Dank'al esperantistoj, kiujn mi denove dankas mi vizitis Pingtung.

Dank'al Waro, kiun mi renkontis dum la Zamenhof-festo kaj kiun mi ankaŭ denove multe dankas, mi malkovris la faman lokon *Hualian*, sur la orienta marbordo. Ni loĝis ĉe lago-bordo ĉirkaŭita de montaro. Mirinda kaj trankvila loko ! Sed atentu la serpentojn ! Tie mi vidis simiojn.

Mi ankaŭ ekskursis kun la universitato en "Sandimen", kio estas loko en la montaro, kiu prezentas la diversajn popolojn aborigenajn, kiuj troviĝis en Tajvano, kaj ties kulturon.

Restas ankoraŭ multaj malkovrotaj vindindaĵoj!

### Por fini

Tiel estas : kiam mi alvenis, ĉio estis nova por mi, mi malkovris iom post iom la universitaton, la urbon, la tajvanan vivon, novajn geamikojn...; estis tre fascina, sed kelkfoje mi renkontis frustrigajn interkomunikad-problemojn. Ĉiu-tage mi malkovris ion novan, ekestis novaj konatiĝoj. Post 2 intensaj monatoj, kiam mi devis foriri, mi sentis min hejme.

Mi tre ŝatis mian restadon tie kaj esperas, ke mi denove baldaŭ revenos. La Tajvananoj estas afablegaj kaj ĉiam helpemaj. Ekzemple, mi memoras ĉiun homon, kiu ĉiĉeronis min en la Confucea Templo, aŭ tiun herbo-farmacistinon, kiun mi petis pri iu loko, kaj kiu kunkondukis min skotere tra la urbo ĝis tiu loko.

Mi denove dankas ĉiujn, kiuj bonigis kaj riĉigis mian restadon. Mi esperas ke mi nun trovos tempon por daŭrigi la lernadon de la ĉina lingvo. Kaj ankaŭ plulerni Esperanton kaj la anglan... Do kiam mi revenos estos pli facile interkomuniki.

Anne Vernet

# TUIKERO LA HARKIO KAJ LA CETERO

**Rigardojn sur la milito en Alĝerio** estas la subtitolo de la unua libro verkita de Roger CONDON. La titolo de la verko estas TUIKERO LA HARKIO KAJ LA CETERO. Ne temas pri literatura verko, sed rakonto pri la vivo de juna franca soldato, kiu realigis sian devigan militservon en Alĝerio, ĉe la fino de la kolonia reĝimo. Li ne nur priskribas sian vivon en diversaj regimentoj en Alĝerio, sed ankaŭ donas sian opinion pri la maniero pritrakti la alĝerianojn, inter ili la Harkiojn, kiuj kunbatalis en la franca armeo.

Sed ankaŭ la soldatservadon en Francio antaŭ la forsendo al Alĝerio li rakontas, kio certe rememorigos vivepizodojn al la viraj francaj esperantistoj, kiuj ankoraŭ estis devigataj soldatservi por Francio !

## Pri la aŭtoro :

Roger CONDON naskiĝis la 2an de aprilo 1941 en San-Albano-ĉe-Limagnolo (Saint Alban sur Limagnole) Lozero. Post la lernejo ĉe la religiaj fratoj li vizitis dum kelkaj jaroj la katolikan duagradan lernejon de Mendo (Mende), antaŭ ol labori en la familia entrepreno.


Je la reveno de la militservo en Alĝerio, iu komerca lernejo, en kiu li sekvis kursojn, proponis al li postenon en Internacia Societo. Tiel en 1963 li iĝis administranto de magazeno, antaŭ ol iĝi inventaro-kontrolisto. Dum tiu lasta periodo, kiun li trapasis vojaĝante en ĉiuj urboj, kie la entrepreno havis magazenojn, li daŭre plibonigis sian profesion kvalifikon dank'al kursoj ĉe "Cned"<sup>1</sup> kaj "Greta"<sup>2</sup>. Fine li trapasis ekzamenojn pri kontado.

Pro iu ne antaŭvidita evento li estis nomumita administranto de la nmoveblaĵoj de granda komerca firmao, kie li laboris ĝis sia emeritiĝo.

Roger CONDON loĝas nun en SARREBOURG (57) kaj estas membro de EFE. Li vere nur hazarde konatiĝis kun ESPERANTO. Ni lasu lin rakonti : *"Mi hazarde ekkonis la esperantan lingvon en februaro 2005, kiam mi esploris la reton por trovi informojn pri iu el miaj prauloj, ĉar mi havis truon en mia genealogia enketo. Mi ne trovis la kondukantan ligilon, kiu certe permesintus al mi ekkoni tiun personon vivintan en la jaro 1670, sed pro iu stranga misfaro aperis ĉe mia ekrano paĝo de Ikurso.net. La vorto "Esperanto" tiklis min, kaj mi scivoleme legis la paĝon, ĝis la aliĝilo, kiun mi tuj plenskribis. Tiel mi iĝis lernanto de Ikurso je la komenco de februaro 2005. Dank' al la konsiloj de miaj korektantoj, Marc Noulin kaj Andreo Morio, mi plulernis ĝis la fino de la kurso "Gerda malaperis". Mi ankaŭ vizitis la kulturdomon Greziljono, kaj poste tiun de Kvinpetalo, kies varma etoso transdonis al mi la volon por plibonigi mian scipovon de la lingvo. "*

Roger CONDON nun pretigas novan libron dulingvan (francan kaj esperantan), kies titolo estos La elprovado\l'épreuve.

1. Perkorespondanda instruservo de la Franca Nacia Edukministerio.
2. Regiona institucio pri daŭra profesia klerigado







## "Nu, kaj do ?"

Rakontoj, Raportoj, Recenzoj, Revoj  
Sen RODIN - eldonejo EXIT - Cluj-Napoca

Principe mi hezitas verki « kritikon » de legita libro pro la simpla kialo, ke mi ne emas kritiki aŭtoron pri verko, kiun mi mem ne kapablintus skribi ! Nu, tio ne malhelpas, ke mi prezentu verkojn, kiujn mi amas !



Jesja ! "Nu, kaj do !" ( ŝajne la dua eldonaĵo de Sen RODIN post "Bildo pri Norda lando kaj aliaj rakontoj" ) estas leginda kaj ŝatinda libro. Eble mi parte tiele pozitivas, ĉar mi iel kunsentas pro vizitado de pluraj landoj, kiujn ankaŭ la aŭtoro konas. Foje mi ja retrovas la samajn impresojn en liaj priskriboj. Sed tio ne estas sufiĉa kialo !


Ne, en tiu libro oni eksentas homon, homaman esperantiston, kiu kredas je la ĝusta kaj justa filozofio de Zamenhof. Cetere : sur la interna kovrilpaĝo alridetas nin la simpatia vizaĝo de la aŭtoro, kies vera nomo estas **Filippo FRANCESCHI**.

En Nu, kaj do ! plej diversas la enhavo de la tekstoj, kaj ĉiam kunrolas biografiaj elementoj, ne mankas kritikaj vidpunktoj pri la socio de l'Italio nuntempa, malkovro de Kluĵo, en Rumanio, lia nova loĝlando, revigaj rakontoj, pli filozofiaj pensoj pri nia movado, ktp, ktp... ! Legantoj de LA INFORMILO retrovos en pluraj tekstoj famajn samideanojn de nia regiono ...

Nu, tutsimple : mendu kaj legu ! Tutcerte vi estos kaptata de rave bela kaj preciza lingvo ! Tro malfrue mi malkovris lin ! Nun, nenio plu « sen » Rodin ! Kaj lia biologia testamento neniam utilu !!!

EL

## ... post "Homo kaj Kosmo", jen "Globusoj" ...



Kiel fuelpilo provizas veturilon per elektro bruligante hidrogenon ?

Du ĉefaj pritraktitaj temoj en la dua kajero : *astronomio kaj mitologio* ( sub la plumo de *Patrick Lagrange* ) kaj *fuelpiloj*. Tiu dua ĉapitro liveras interesajn detalojn pri la aluditaj "piloj" ĝenerale, sed plue pri tiuj uzataj en la modernaj kosmoŝipoj.

Por iom pli cerbumigi la leganton, jen kvin enigmoj, kies solvoj -feliĉe ?- kuŝos en la sekve aperanta kajero.

Ĉu vi deziras ricevi "Globusoj" -n ? ... sendu mesaĝon, poŝte aŭ interrete, al

[www.globusoj.org](http://www.globusoj.org),

Dominik Bertrand, 7, rue des Brulis, FR-77320 JOUY-sur-MORIN


[dominik@globusoj.org](mailto:dominik@globusoj.org)

## ... por ŝatantoj de sciencfikcio !...

Lenn Jonas - "La karna maŭzoleo" - Francio – eldonejo "La Arĝenta Ŝlosilo"

Esperantigita el la franca de *Emmanuel Desbrières*, *Florence Desbrières* kaj *Ginette Martin* ( Francio ), kun helpo de *Saliko* ( Finnlando ).

"Aŭguste 1940. *Nicola Giuliani*, anarkisto kaj ĵurnalisto, iras al *Meksikurbo*, firme





Rennes - Francio - 4a de Novembro 2010 - Informas *LinguaForce*



La profesia ekspoziciego SIAL okazis apud Parizo inter 17a kaj la 21a de oktobro 2010. Inter ties pli ol kvinmil budoj, unu el la grandaj estis tiu de Triballat.

Sur tiu ĉi, kune kun diversaj produktoj kaj novaĵoj, videblis pakaĵo de la jogurtoj *Sojasun* **tute en Esperanto!** Ĝi estis prototipo tie prezentata estante kandidato por novig-premio. Esperantigis ĝin la kompanio LinguaForce en Rennes.

En artikolo de la septembra numero (28) de la profesia revuo CFIA, *Olivier Clanchin*, estro de *Triballat*, klarigas sian intereson por Esperanto...

## Eŭropiĝi por entrepreno... "labori kun la Esperanto"

(...) Konsideri la morgaŭon signifas ankaŭ konstrui eŭropan kulturon. Kiam oni parolas pri "eŭropa kulturo" ankaŭ temas pri "komunikado"... "Ni ekopiniis ke Esperanto povus esti modelo". Kiam, aŭdinte tion, oni ironias pri Esperanto, la estro ekridetas: "Nu, ankaŭ ĉikaze, same kiel por 'Bio' kaj *sojo*, ekzistas homoj, kiuj deziras kredi en ĝi. Ni kredis en la aliaj projektoj... do Esperanto, kial ne? Tio indas, do oni provu. Estas pozitive preti sukcesigi defiojn!" La entrepreno estas bona vektoro por testi tiun koncepton.

Ekde kiam estas io kolektiva kun homoj, kiuj ne uzas saman lingvon, Esperanto povas esti kohera ilo, kiu regatas dekfoje pli rapide ol la angla. "Ni ne forgesu ke ni estas Eŭropo 27-opa. Se ni ĉiuj havus komunan lingvon, tio plirapidigus multajn demarŝojn. Krome, en la logiko de daŭripovo, tie kie oni parolas pri malpligrandigo de pakaĵoj, kiel fari per tiom da lingvoj, kiom da landoj, kiam oni volas eksporti unusolan produkton? Kiam vi aĉetas hejmajn aparatojn, kiom da kilogramoj da papero estas, da manlibroj, en ĉiuj lingvoj? Esperanto estas la sola justa lingvo... ĉar neniu naskiĝas kun ĝi. (...)"

---

## ... pour les curieux ... et les autres !...

A noter la mise en ligne sur *Youtube* de ce qui semble être le premier volet d'une série ( "*Les histoires de l'histoire*" ) racontée par André CHERPILLOD.

Cette première vidéo ( en français ) consacrée au *suaire de TURIN* est le résultat de la collaboration de deux éminents espérantistes : le sarthois André CHERPILLOD ( est-il nécessaire de le présenter ? ) et le suisse François RANDIN, créateur de *DANNIR* Réalisations ( <http://home.citycable.ch/> )

La vidéo d'une dizaine de minutes se termine d'ailleurs par un très court message en espéranto :

<http://www.youtube.com/watch?v=7t9tNMnHo8c>

---

## A propos d'un dérapage verbal ...



Dans une interview en anglais au quotidien israélien *Haaretz*, Bernard Kouchner\*\*\* a déclaré qu'Israël allait "*manger*" l'Iran, si ce dernier se dotait d'une arme nucléaire ; en fait il voulait dire "*hit*" ( frapper ) mais il a oublié de prononcer le "*h*" et a trop allongé la voyelle "*i*" qu'il fallait prononcer très brève, si bien que ses interlocuteurs ont compris "*eat*" ( manger ) et ont reproduit l'erreur dans le journal. Il a fallu qu'il démente officiellement.


\*\*\* ex-ministre des Affaires Etrangères

---

Ne forgesu sendi senprokraste vian aliĝilon por enpartopreni nian "printempan" staĝon !  
Aprezos la skipo, kiu prizorgas la eventon !

## Le haut-le-cœur d'un Québécois face à l'anglicisation de la France

Par Jean-François Lisée | Cerium, Montréal | 16/11/2010



(De Montréal) L'ami Christian Rioux a connu une expérience malheureuse l'autre jour dans une entrevue où il vilipendait l'usage excessif de mots anglais en France. Il s'en est ouvert dans sa chronique du *Devoir* :

« Tout allait comme sur des roulettes, jusqu'à ce que l'animatrice dégage la question qui tue : "Alors, si le français se porte si bien chez vous, expliquez-nous pourquoi tant de jeunes Québécois chantent en anglais et pourquoi, dans le dernier film de Xavier Dolan ['Les Amours imaginaires', ndr], il n'y a pas une phrase sans un mot anglais ? " »

Le constat est aussi brutal qu'exact. Il me semble aussi qu'il y a une montée du nombre de mots anglais dont on saupoudre volontairement nos dialogues -à l'écran comme à la ville. Rioux nous avertit :

« Qu'on se le dise, nous n'abuserons plus très longtemps les Français [car] ils ne sont pas plus sourds que nous quand ils débarquent à Dorval [aéroport qui dessert Montréal, ndr]. »

Le militant du français correct *Gaston Bernier* lui a emboîté le pas dans le même journal en ajoutant ceci :

« De méchantes langues ont parfois affirmé que si des artistes faisaient dans le *franglais* ou dans le parler québécois, c'était qu'ils seraient bien en peine d'accorder les participes passés, de mettre une virgule ou un point-virgule à la bonne place, d'identifier un synonyme d'un mot qui vient d'instinct ou le mot français qui correspond à un mot d'origine anglaise implanté en sol québécois. »

Il nous apprend même quelques mots au passage ( à moi en tout cas ) lorsqu'il décrit notre doxa linguistique :

« Conservatisme ambiant en la matière, inutilité des efforts ( lesquels ne rapporteraient rien ), psittacisme ( répétition mécanique de mots ou d'expressions par un sujet qui ne les comprend pas ) ou panurgisme ( comportement selon lequel on agit pour faire comme tout le monde ). » Je n'en disconviens pas et j'ai moi-même, il y a quelques années, encouragé la Fédération des journalistes à lancer un programme volontaire par lequel ses membres se faisaient corriger leurs erreurs par des terminologues par le truchement d'un courriel hebdomadaire personnalisé. Je souhaiterais que cette initiative s'étende au-delà de la seule faune journalistique.

Une différence de degré

J'estime cependant que si le français québécois souffre "d'en bas", de la langue telle que pratiquée au quotidien, le français de France, lui, souffre "d'en haut". La différence entre le phénomène français et le phénomène québécois, ou du moins une différence, est qu'ici, les institutions ont encore le réflexe de protéger le français alors qu'en France, elles succombent à l'appel et en répercutent le pouvoir d'attraction. Et par institutions, je pense autant aux tentacules de l'État qu'aux grandes entreprises. Comme [francophonie-en-france-le-calvaire-de-l-opimiste] sur *Rue89* :

" La chaîne d'alimentation *Champion* se rebaptise *Carrefour Market*, son concurrent *Auchan* affiche *Simply Market* et le groupe *Casino* lance *Leader Price*. [...] On savait qu'*Air France* avait renommé sa carte de fidélité *Fréquence Plus* en *Flying Blue*. On note maintenant que les aéroports de Lyon se sont rebaptisés *Lyon Airports* [mise à jour : avant que le préfet n'intervienne et n'annule cette opération de *rebranding* qui aura coûté 200 000 euros en pure perte]. "

Il a fallu l'action d'activistes pour que la région de la vallée de la Loire renonce à s'afficher, même localement, sous le vocable *Loire Valley*. *La Compagnie française des Jeux* n'hésite pas à clamer dans ses pubs " *J'ai la wiiin !* " et la

Banque nationale de Paris propose aux jeunes ses produits *Ze Box* et *Naked Land*. Je ne vous explique pas. Le patronat mène le bal. Son organisation nationale, le *Medef*, avait réuni ses états généraux l'an dernier sous le thème unilingue "*Go for benchmarking!*" et a consenti cette année à un thème bilingue : "*Vivement l'avenir/Ready for the future*". C'est pourtant une rencontre ouverte aux seuls patrons français.

## Lagarde, la "carpette anglaise"

La ministre française de l'Economie, *Christine Lagarde*, a reçu en 2007 le convoité prix de l' [academie-de-la-carpette-anglaise] pour avoir communiqué en anglais avec ses propres fonctionnaires -ce que font déjà de grandes entreprises de France. Et la ministre de l'Enseignement supérieur et de la Recherche, *Valérie Pécresse*, l'a obtenu en 2008 en affirmant qu'elle ne militerait pas « pour imposer l'usage déclinant du français dans les institutions européennes », même pendant la présidence française de l'Union.

Fin 2010, Marseille a adopté un nouveau slogan : "*Marseille on the move*". En Savoie, on signale dans la station de Tignes l'ouverture d'un *Bike Park* qui offre aux *Mountainbikers* du *downhill*, du *free style*, des *jumps* et un *single track*. Et la Conférence des évêques de France est venue bénir la dérive en lançant en avril une campagne de pub où on voit le macaron : "*Jesus is my boss*".

Les médias ne sont pas en reste. Je me suis amusé à relever l'utilisation de l'anglais dans la seule titraille interne du numéro été du magazine *Elle*. Avec le *make-up* on a une "*Bonne note fashion*", bien sûr. Des lunettes sont *hot couture* ( je pardonne car il y a jeu de mots ), on présente le mannequin *Golonovanoff on holiday* ( autre jeu de mots ), qui nous présente son *summer best* ! La page "*Do it yourself*" présente le *Short Patch, step by step*. Il y a la page *Beauty Bar*, non loin d'une photo équestre de Sophie Marceau présentée comme une *pretty amazone*. Normal, car l'article est titré : "*Dreams are sa réalité*". Puis vient la section "*La plus belle pour aller clubber*" qui présente les styles *glam rock, chic sixties, rodeo style* et *disco girl*. Non, je n'ai pas fait de *cherry picking*, c'est la liste complète, 100% anglische.

Une salade plus *light* ou plus *veggie* ?...

Et sur *Rue89* ?


*Live blogging, making of, tchat, newsletter...* A *Rue89*, on contribue ( un peu ) à cette l'anglicisation.

[ ... / ... ]

L'assaut anglophone est moins complet dans la section salades : 2/8 seulement avec "*la plus light*" et "*la plus veggie*". On se reprend dans la section "Vie privée" avec "*Boostez votre créativité*" et "*Addict au régime* [ ... / ... ]

Mon argument est le suivant : on trouve tout plein d'anglicismes au Québec, y compris, ça et là, dans la communication des médias, des publicitaires et entreprises et des institutions. Mais le niveau atteint aujourd'hui en France provoquerait un haut-le-cœur immédiat chez les responsables québécois de ces institutions.

Et si vous croyez que cette mode au *tout-à-l'angliche* ne concerne que les Parisiens, voyez la photo envoyée cet automne par l'alertinternaute *Claude Bédard*. Elle vient d'une rue commerçante de... Bordeaux.





menuero "2010 Verde, Verda". Sur la etikedoj la frapfrazo vorto "verda" en hungara ĵargono signifas aŭtomobilon :-)

Pri la konkurso mem, pri la lotumado kaj transdono de premio pliaj fotoj estas videblaj ĉe [www.veddesnyerd.eu](http://www.veddesnyerd.eu) sub la menuero "Galeria 2010".

Gratulojn al s-ano Ódor György kaj lia edzino, ni deziras agrablajn vojaĝojn per la nova aŭtomobilo, kaj ni dankas lin pro vestado de Esperanta T- ĉemizo.

Jen ankaŭ tiel oni povas disvastigi Esperanton :-)

inf. Szilvási L.

ret-info <http://www.eventoj.hu>

## Air France condamnée en appel à traduire en français des documents techniques



PARIS — La cour d'appel de Paris a condamné **Air France** à traduire en français certains documents techniques destinés aux pilotes, qui leur étaient jusqu'à présent remis en anglais, a-t-on appris mercredi.

Dans cet arrêt daté du 1er octobre, consulté par l'AFP, la cour d'appel, qui avait été saisie par le syndicat de pilotes *Alter*, infirme le jugement prononcé en novembre 2008 par le tribunal de grande instance de Bobigny. La cour d'appel ordonne la mise à disposition par *Air France* de ces documents en français dans un délai de six mois, sous peine d'une astreinte de 5.000 euros par document et par jour de retard.

Devant la justice, *Alter* s'est appuyé sur la loi *Toubon* du 4 août 1994 relative à l'emploi de la langue française, a expliqué son avocat, Me David Métin. Il a fait valoir que ces documents techniques, distribués en anglais, pouvaient donner lieu à des erreurs d'interprétation susceptibles d'affecter la sécurité des vols, notamment s'ils étaient utilisés dans des situations d'urgence.

Interrogée par l'AFP, *Air France* a indiqué qu'"un pourvoi en cassation va être formé". La compagnie aérienne a fait valoir que toute traduction pouvait "avoir une incidence" sur la sécurité. "Par conséquent, pour une raison de principe de sécurité et de préservation des passagers, *Air France* ne souhaite pas avoir la responsabilité de la traduction". Dans ce cas précis, comme il s'agit de textes en anglais émanant du constructeur, *Air France* considère que "c'est au constructeur d'effectuer ces traductions, si elles doivent être effectuées, avec l'aval des autorités nationales et internationales".

Lastminuta informo ( 8 / 12 / 18h ! ) ...

### BIBLIAJ TAGOJ

... Kun la *BIBLIO* kaj *ADORU*, la ekumena preĝ- kaj kantlibro en Esperanto, de merkredo, la 2-an de marto 2011 ( vespermanĝo je la 18-a horo ) ĝis dimanĉo la 6-an de marto, post la tagmanĝo.

Oni povas ankaŭ veni de vendredo ĝis dimanĉo

Petu aliĝilon en la kunveno ĉe :

Pastro Stefan LEPPING , Collegium Aloysianum (« Konvikt »)  
D 59457 WERL , Mellngstr. 5, Germanio

## Pri la "ruĝa ŝlim-katastrofo" de Ajka ( Hongrie )



inundis, neniigis la vilaĝon *Kolontár* kaj kovris plurdek kvadrat-kilometrojn da grundo de la setlejoj *Kolontár*, *Devecser* kaj *Somló-Vásárhely*.

La tre koncentrita lesivo enhavas kaŭstikan efikon. Tiu ĉi rubaĵo disterniĝis 40 km<sup>2</sup>, kaŭzante netakseblajn ekonomiajn kaj ekologiajn damaĝojn en regiono de la urbetoj *Ajka* kaj *Devecser*.

Al la morto de dek homoj, aldoniĝas pli ol 150 vunditoj. Iam "bonŝanco" estis, ke la katastrofo okazis dumtage. Se ĝi okazintus dumnokte, preskaŭ la tuta loĝantaro de la vilaĝo *Kolontár* pereintus.

La koncentrita lesiva poluaĵo ekstermigus la tutan vivantaron de la rivereto *Marcal* kaj *Torna-patak*. Oni povus detaligi la antaŭaĵojn de la katastrofo, la tujajn dispoziciojn, la homajn tragediojn, la ekonomiajn kaj mediajn damaĝojn, la helpon de la tuta hungara socio kaj eksterlandajn subtenojn, la esplorojn de la kaŭzoj, kaj konstato de la respondeco/kompesodevo. Nu, unuflanke, ĉi tiuj temoj suprenpasus kadron de tiu ĉi raporto, aliflanke, kelkaj demandoj el ili ankoraŭ ne havas respondon.



Nuntempe daŭras damaĝ-taksado, malhelpado de la pluaj damaĝoj, damaĝ-foriĝo, kaj setlej-rekonstruado.

Julia Humana  
(el *Budapesto*)

NB - Tiun menso-streĉan raporton, kiu rememorigas certgrade la katastrofon de la uzino AZF en Tuluzo ( 21 / 09 / 2001 ), ni ŝuldas al nia hungara samcelanino, kiu jam aŭtoris tekston pri la „*Rubik's Kubo*” por nia bulteno.

aldonaĵo al la interesoplena supre aludita artikolo

### pri "Rubik's Cube"



La 13an de novembro en Melburno, la juna Aŭstraliano *Feliks Zemdegs* starigis novan mond-rekordon (rapideco), racie-restrukturante iun *Rubik's Cube* en 6,77sekundoj!

Ekzistas alia oficiala rekordo, ĉiam bazita sur la meza "tempo" bezonata, post manipulado de 3 kuboĵoj inter 5 (ne-enkalkulitaj estos la plej rapida provo kaj la plej malrapida).

Tiun rekordon ankaŭ posedas *Feliks*, kun 7,91 sekundoj.

(foto: ekran-kapto el filmeto pri la evento)



## ... Ĉyрил kaj Roz', niaj du kuraĝaj gebiciklantoj, fidelas al "la Informilo" ! ...



... "Ni vespere eliras el la *unuĝintaj ŝtatoj de Ameriko* por eniri en la *unuĝintajn ŝtatojn de Meksiko* tra la urbo *Tijuana*, iu landlimo el la plej trapasataj en la mondo. *Tijuana* ankaŭ fifamas pro la ŝakrado de armiloj kaj narkotaĵoj, kaj la kaŝa transpaso de senpasportuloj. Tie, sudamerikanaj elmigrantoj ĉiutage provas pasi per ajna rimedo kun la espero, ke ili trovos eldoradon je la alia flanko. *Tijuana* proksimas de la oceano. Survoje tien, ni laŭbiciklas la altajn palisarojn, kiuj apartigas ambaŭ landojn, eĉ en la blua akvo de Pacifika Oceano. Je la meksika flanko troviĝas turisma plaĝo viva kaj vigla kaj je la usona flanko etendiĝas plaĝo blanka kaj dezerta je pluraj kilometroj.

Ni longe hezitis pri la elektinda vojo, ĉar ĉiuj promesas, ke tiu vojo aŭ tiu alia pli ebenas aŭ pli sekuras. Ni decidis pasi tra *Ensenada*, en la kalifornia duoninsulo, kiu iras ĝis *La Paz* kaj trapasas la dezerton de *Sonora*. Temas pri vera dezerto, sen akvo. Cirilo portas, krom la kutimaj sakoj je 30 kg, 7 litrojn da akvo... Ni fotadas kaktajn arbarojn, kaj la varmo estas neeltenebla. Tamen, dumnokte, estas plezurige dormi meze de la dezerto sub la luno! En *Santa Rosalia* ni enŝipiĝas al *Guaymas* por forlasi la duonisulon. Jam la morgaŭon ni pluiras per buso al *Gvadalaharo*. Ni ne havas elekton, niaj gepatroj venos al Meksikurbo por renkonti nin post du semajnoj, kaj tempo mankas al ni. En du tagoj ni pasigas 18 horojn en transportiloj. Feliĉe, en *Gvadalaharo*, la juna esperantistino *Sara* gastigas nin kaj ni povas bone ripozi. Ŝi igas nin gustumi la lokajn nutraĵojn, interalie pitajon, specon de kaktofrukto. Por danki ŝin, ni prezentas al la



loka Esperanto-klubo fotojn pri nia vojaĝo. Poste, la naŭ junaj esperantistoj malkovrigas al ni la monumentojn famajn kaj malpli famajn de sia urbo. *Ulises*, kiu ankaŭ scipovas la Lingvon Internacian, siavice gastigas nin tri tagojn en alia kvartalo de *Gvadalaharo*, la urbo de kie originas la du ĉefaj turismallogaĵoj, mariakoj kaj tekilo.

En Meksikurbo, ni ankaŭ komunikas en Esperanto kun *Alejandro*, kiu akceptas nin siahejme. Ankaŭ li donas al ni valorajn informojn pri la kulturo kaj la vivo en lia lando: « *Ni staras sub la luna umbiliko* », laŭvorta traduko de la vorto Meksiko. Li informas ankaŭ pri la meksika juro, ĉar, same kiel en Usono, ĉiu ŝtato sendependas kaj la leĝoj kaj regularoj ege malsamas inter ŝtatoj. Kelkajn tagojn poste, alvenas en Meksikurbo niaj gepatroj. Ili kunportas en siaj sakoj novan tendon por ni, ĉar la nia difektiĝis. Ili ankaŭ alportas biciklerojn... kaj tubon de franca mustardo ! Nuntempe okazas la tutmonda piedpilka konkurso, la tuta lando estas ekscitita, precipe post la venko kontraŭ Francio, ĝis kiam ĝi fine estas eliminata. La tagojn kiam okazas matĉo, ni vizitas la ĉefurbajn ĉirkaŭaĵojn por eviti la homamason arigantan fronte al la grandega ekrano sur la ĉefplaco tre proksime de nia hotelo. Ni tiele vidas la aztekajn piramidojn de *Teotihuakano* en la nordo kaj flosĝardenojn de *Xochimilco* en la sudo. Plu kun niaj gepatroj, ni busas al *Akapulko* por naĝi en la hela akvo de Pacifiko.



Post ilia foriro, ni direktiĝas al Atlantiko. Unuavice al *Puebla* kaj *Verakruzo*, antaŭ ol kromiri al *Palenque* por viziti piramidojn. Ni fine pasas tra *San Cristobal de las Casas*, de kie ni alvenas je la landa ekstremaĵo.

Ni restis en Meksiko preskaŭ tri monatojn kaj ni biciklis pli ol 3000 km, kio ekvivalentas je tri fojoj Parizo-Perpinjano. Ni plurfoje pasis de la marnivelo ĝis pli ol 2000 metroj alte, kun pinto je 3100 m. Kaj ni trabiciklis la landon de Pacifiko ĝis Atlantiko.

1 la landlimo kun Usono estas ege protektita, ĝis en la maro ! - 2 gigantaj kaktaj. - 3 la infera deklivo, sen ajna dubo, iu el la plej teruraj de la vojaĝo, en dezerteca pejzaĝo, kaj sub sveniga suno ! - 4 La azteka kalendaro sur ŝtonego por homaj buĉferoj ! - 5 En ĝangalo malmulto vestas ! - 6 Majaaj ruinoj.







# El nia libroservo

## Informoj



⇒ La tuta listo de niaj libroj nun aperas en la regiona retejo :

**[esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr](http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr)**

⇒ La libroservo partoprenos la komunan semajnfinan staĝon organizitan de Esperanto France Est en Ban Sur Meŭrthe la 2/3ajn de aprilo 2011.

Multaj el niaj 680 titoloj atendas vin tie sed se vi volas certe trovi dezirata(j)n libro(j)n, sen devigo ĝin (ilin) aĉeti, sendu al mi mesaĝon al [libroservo.ef@wanadoo.fr](mailto:libroservo.ef@wanadoo.fr) JLT



## Resumoj, recenzoj, opinioj...

### MOZAIKO (Clélia) - Memeldonaĵo

Dum deĵorado ĉe grava librofoiro en la urbo Saint-Louis (Suda Alzaco) vizitis nian Esperantobudon ĉarma virino, kiu diris al mi : Mi nomiĝas Clélia kaj verkis la jenan libron, kiun mi titolis MOZAIKO. Mi donacas ĝin al vi kaj estus ĝoja, se iam ĝi aperus en Esperanto. Jen mia ret-adreso ! », kaj ŝi forlasis la budon.


Librojn mi ŝategas kaj eĉ dum paŭzo dum la deĵorado, mi eklegis ! Ja strangis la rakonto kaj la stilo, sed hejmenveninte mi tuj ĝin finlegis, dirante al mi : jen etoso bonege esprimita, sed ĉu tian stilon mi kapablus redoni en Esperanto ?

Longe mi hezitis, sed pro tempomanko mi provis trovi kuraĝulon, kiu tion akceptus fari. Tiu kuraĝulo estis Daniel LUEZ, kiu kontaktis Clélia. Ŝi cetere eklernis Esperanton kun sia tradukisto !

Kaj jen la libro, kies titolo bonege ilustras la vivon en « skubiduo », t.e. granda loĝbloko en alzaca ĉirkaŭurbo. Vi ekscios pri la eta Forbub', kiu kreskas inter la skubiduoj. Ne facilas por la patrino Pluma eduki sian knabon, kiu ankaŭ edukiĝas meze de samaĝuloj. Vi ekscios pri biciklo, hamstroj, kato, hundo, lia instruisto, ktp ! La plenkreskuloj provas eduki tiun « hidrarguleton ». Iel sukcesas Luna (profesia konsilantino pri familia ekonomio), lia « feino » loĝanta en Nancy , kiu regule vizitas lin per sia aŭto, iu « duĉevalo », kaj ankaŭ malkovrigas al li la Vogezojn kaj ties valojn, ĝis li adoleskiĝas. Tiam ankaŭ ŝi havos propran infanon. Ĉu Forbub' akceptus kaj kapablus iĝi la « feino » de la naskiĝonta bebo ???

Jesja, restas bedaŭrinde kelkaj eraroj, sed ĉiuj inter vi certe havos la impreson, ke vi konas tiun etoson kaj malkovros la specifan rakontan stilon !

E.L.



## Por mendi librojn :

### 1. Vi sendas vian mendon

- per poŝto (la plej sekure) al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDOEUVRE (uzante la dorsflankan mendilon)

- per e-poŝto al «[libroservo.ef@wanadoo.fr](mailto:libroservo.ef@wanadoo.fr)»

- nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.

### 2. Vi baldaŭ ricevas viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj)

3. Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al «libroservo 2800-76 H NANCY» (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo «libroservo» sendita al la adreso de la libroservo.

Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al «LIBROSERVO» IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031 97 BIC :

PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo




## Nove alvenintaj libroj :



1




2



3



4



5

1) **Flugi kun kakatuoj**, Romano, **Trevor Steele**, *F.E.L.*, 256 p, 16,50 €. Juna aŭstrala aborigeno gvidas rezistan luktadon kontraŭ blankula koloniado.

2) **Esperanto de nivelo al nivelo**, Ekzamenlibro, **Opo**, *Idegennyelvi Továbbképző Központ*, 136 p, 8,75 €, Libro prezentanta la taskojn postulatajn por trapasi diversnivelaĵajn esperanto-ekzamenojn.


3) **Tuikero la Harkio kaj la cetero**, Historio, **Roĝero Kondono**, *SAT-EFK*, 150 p, 15,00 €. Rakontado de vivo de juna soldato en Alĝerio dum la maldependiĝo-milito.

4) **Traktaĵo pri ateologio**, Eseo, **Michel Onfray**, *SAT-EFK*, 186 p, 18,00 €. Eseo pri ateologio, monoteismoj, kristanismo kaj teokratio.

5) **Detala gramatiko de esperanto**, Gramatiko, **Bertilo Wennergren**, *ILEI*, 222 p, 9,00 €. Gramatiko de Esperanto racie prezentita per 29 ĉeftemoj dividitaj en subpartetojn.




6



7



8



9



10



11

6. **Vikipedio por vi**, Movado, **Van Dijk**, *Espero*, 4,50 €. Kio estas Vikipedio, kiel legi ĝin, kiel kontribui al ĝi.

7. **La karna Maŭzoleo**, Romaneto, **Jonas Lenn**, *La Arĝenta ŝlosilo*, 52 p, 10,00 €. En 1940, ĵurnalisto provas renkonti Leonon Trocki, murditan 3 monatojn antaŭe !

8. **Kiel vaglumo**, Novelo, **Willem Elsschot**, *F.E.L.*, 176 p, 10,00 €. En pluva malmilda novembro, tri maristoj serĉadas virinon...

9. **Nu, kaj do ?**, Diversaĵoj, **Sen Rodin**, *Exit*, 160 p, 9,90 €. Rakontoj, raportoj, recenzoj, revoj pri : perdita ŝanco..., la terno,....stranga koŝmaro,....mediteranea breviero.....

10. **Verdeskaj pensoj**, Aforismoj, **Georgo Handzlik**, *Kleks*, 136 p, 6,00 €. Kolekto de spritaj, ofte humurplenaj esperanto-aforismoj de diversaj esperantistoj aŭ de la verkisto mem.

11. **Pro Iŝtar**, Romano, **Luyken**, *Hirt & Sohn*, 306 p, 3,00 €. Tute ne nova, tiu libro eldonita en 1924 reaperas post longa dormado en la stoko de Internacia Esperanto Instituto. Originala romano el la antikva Babela historio.

## Mendilo

Bonvolu sendi tiujn librojn:

-  
-  
-  
-  
-

al jena adreso:

S-ro/ino  
-  
-  
-  
-

En

la

Subskribo:

# Nos cotisations 2011

Vous venez de recevoir le dernier numéro de notre bulletin trimestriel, **LA INFORMILO** pour la période 2010. Vous avez sans doute apprécié son contenu et vous désirez continuer à le recevoir régulièrement pour 2011 (4 numéros par an). A cet effet nous vous présentons ci-dessous les différentes cotisations 2011 et nous vous invitons à les payer dès maintenant. Nous espérons ainsi vous retrouver parmi nos abonnés ou nos membres.

## COMMENT PAYER VOS COTISATIONS ET VOTRE ABONNEMENT ?

### 1. Association Régionale ESPERANTO FRANCE-EST :

La cotisation à notre Association Régionale ainsi que l'abonnement à **LA INFORMILO** sont à payer:

- de préférence par virement postal à **Espéranto France-Est CCP 1997 72 W NANCY** n'oubliez pas de mentionner sur la ligne de message le but de votre paiement et si possible votre code-adresse. *Ex. Abono Inf + kotizo 2011 por 756*
- par chèque bancaire à l'ordre de **Espéranto France-Est**, mais adressé à notre trésorier: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM.
- Profitez de votre paiement pour mentionner tout changement ou correction d'adresse. Une adresse différente sur un chèque n'est pas considérée comme nouvelle adresse.

#### Nova

- Une nouvelle cotisation fédérale de 20 euros vous est proposée. Elle permet de déduire 66% des impôts. Ainsi vous n'aurez payé que  $20 - 66\% = 6,80$  euros, mais notre association aura reçu 20 euros.

Abonnement et cotisation pour les années:	2011	2012	2013
Abonnement à <b>La INFORMILO</b> adresse en France	14 €	15 €	15 €
adresse à l'étranger	18 €	18 €	18 €
Adhésion à l'Association <b>Espéranto France-Est</b> (à rajouter à l'abonnement)			
• Cotisation fédérale	7 €	7 €	7 €
• Cotisation fédérale de soutien avec reçu fiscal pour bénéficiaire de 66% de réduction d'impôt	20 €	20 €	20 €

### 2. Association Internationale UEA (cotisations 2011)

Les cotisations à l'UEA peuvent être payées directement à notre association **Espéranto France-Est** par l'intermédiaire de notre trésorier S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM qui transmettra dans les meilleurs délais.

Veuillez noter le code de la cotisation que vous payez. (cotisation UEA MA)

UEA	• Membre individuel reçoit le petit guide de l'UEA	MG	10 €
	• Membre individuel reçoit l'annuaire de l'UEA	MJ	25 €
	• (+KONTAKTO + TEJO-TUTMONDE, si moins de 30 ans)	MJ-T	25 €
	• Membre individuel reçoit l'annuaire de l'UEA + la revue mensuelle ESPERANTO	MA	61 €
	• (+KONTAKTO + TEJO-TUTMONDE, si moins de 30ans)	MA-T	61 €

### 3. Association Nationale Espéranto-France (UFE) (cotisations 2011)

Les cotisations à l'UFE sont à payer directement à UFE, 4bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS - CCP: 85535D PARIS, en y joignant le bulletin d'adhésion, que vous avez reçu en tant que membre 2010 de l'UFE. **Votre adhésion à notre Association Régionale est comprise dans les cotisations de l'UFE si votre adresse se trouve dans les départements 54 55 57 67 68 88.**

**Par contre l'abonnement à LA INFORMILO est à payer à notre Association Régionale, mais jamais à l'UFE.**

UFE	• Membre actif d'Espéranto-France (avec reçu fiscal)	39 €
	• Membre actif d'Espéranto-France et d'Espéranto-Jeunes. (moins de 30 ans au 1.1.2011) (reçoit Jeunesespéranto info.)	30 €
	• Tarif réduit pour étudiants, chômeurs	15 €
	• Cotisation pour un couple (avec reçu fiscal)	78 €
	Abonnement au magazine bimestriel <b>Le Monde de l'espéranto</b> .	+18 €

## IMPORTANT


- Les nouveaux adhérents à l'Association Régionale, recevront par courrier séparé leur carte de membre ainsi qu'un exemplaire des statuts de l'Association.
- Les cartes de membre de l'année 2011 et éventuellement de l'année 2012 seront envoyés aux autres membres d'**ESPERANTO FRANCE-EST** par courrier séparé avec des informations spécifiques réservées aux membres.
- Les membres payant une cotisation fédérale de soutien ou un don en 2010 recevront un reçu fiscal pour bénéficier de 66% de réduction d'impôt pour la déclaration à faire en 2011.

## ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2011 ĝis 2013

Nia asocio **Esperanto France-Est** havas la rajton atesti pri ricevataj donacoj aŭ kotizoj, dekalkuleblaj de la impostoj. La principo estas, ke eblas dekalkuli de la impostoj 66% de donaco aŭ kotizo al nia asocio. Tial ni povas proponi al vi kotizon je 20 eŭroj el kiuj 66% povas esti dekalkulitaj de viaj impostoj. Tiam entute vi estos paginta  $20 - 66\% = 6,80$  eŭroj, sed nia asocio estos tamen ricevinta 20 eŭrojn. Se vi pagas tian kotizon aŭ pli, nia kasisto sendos al vi ateston, kiun vi povos aldoni al via imposto deklaro.

La atestoj rilatas al pagoj de kotizoj kaj donacoj ricevataj en 2010 (principe ĝis la 31a de decembro) por la imposto-deklaro de 2011.

Bonvolu trovi ĉi-poste la tarifojn por la venontaj 3 jaroj. Ni proponas al vi jam nun, antaŭ la fino de 2010, pagi vian abonon al **La Informilo** laŭ la ĉi-suba tarifo. Krome vi povas elekti inter la 2 membro-kotizoj por nia asocio, laŭ via situacio rilate al impostoj.

	Jaroj:	2011	2012	2013
Abono por adresoj en Francio:		14 eŭroj	15 eŭroj	15 eŭroj
Abono por adresoj ekster Francio:		18 eŭroj	18 eŭroj	18 eŭroj
Federacia kotizo:		7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj
Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj		20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj
Paganieroj	<b>1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio:</b> <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2011 por 1208			
	<b>2. Per bankĉeko aŭ poŝtĉeko je la nomo de:</b> <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al .... ktp por 2011, 2012 ktp. Se necese menciu vian adres-ŝanĝon aŭ adres-korekton.			
	<b>3. Por Germanio al nia peranto:</b> Poŝtĝirokonto: 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA Ludwigshafen, je la nomo de: Hans-Dieter Platz. (menciu la celon de via pago)			
	<b>4. Per internacia ĝiro je la nomo de Esperanto France-Est kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn:</b> IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adreskodon)			

### J A R KOLEKTO DE TAKE 2010

En oktobro 2010 aperis la nova eldonaĵo de TAKE (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj), nome la **JARKOLEKTO de TAKE 2010**. Ĉi-jare eldonita de Kava-Pech en Ĉeĥio. Temas pri 100-paĝa bel-aspektas libreto en formato A5. Ĝin redaktis Jan Werner el Ĉeĥio. Kvin aŭtoroj kontribuis per artikoloj por tiu teknika verkaĵo. Ĝin ricevis ĉiuj membroj de TAKE. Ĝi estas ankaŭ aparte akirebla por 6 eŭroj (sendkostoj inkluzivitaj).

**Nia propono:** se vi pagas 12 eŭrojn, vi ricevos la JARKOLEKTON de TAKE 2010 kaj estos membro de TAKE por la jaro 2011.

ENHAVO		JARKOLETOJ de TAKE	
Jan Werner (CZ)	Antaŭparolo de la redaktoro	(libretoj en formato A5 inkluzive sendkostoj)	
Václav Čilek	Malpliigado de la mondo (fejetono)	<b>2006</b> 104-paĝoj 7 aŭtoroj	
Fabien van Mook (NL)	Fazoŝanĝaj materialoj en la mantelo de ĉambroj	redaktis Fabien van Mook	6 eŭroj
Rémy Bouchet (FR)	Konstrukto-ŝtalo	<b>2007</b> 54-paĝoj 5 aŭtoroj	
Franc Maleiner (SI)	Lagunaj purigejoj	redaktis Bronislav Čupin	5 eŭroj
Jan Werner (CZ)	Radiadŝirmaj betonoj en nukleenergiaj centraloj	<b>2008</b> 64-paĝoj 6 aŭtoroj	
	Konstru-Forumo en la jaroj 2002-2010	redaktis Đorđe Obradović	5 eŭroj
		<b>2009</b> 88-paĝoj 6 aŭtoroj	
		redaktis Rémy Bouchet	6 eŭroj



# distra angulo

## jarfina konkurso




du solvintoj de la enigmoj estos lote elektitaj kaj ricevos donace  
iun verkon el la katalogo de nia libroservo  
( sendo al la redakto antaŭ la 31a de januaro 2011 )

### 1 - vertikala enigmo

Helpe de la ĉi subaj "silaboj", alfabete ordigitaj, malkovru la 19 vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La unua kaj kvara kolumnoj, vertikale legataj, eldonas humuran citaĵon.

ano as ar ce cio do eĉ el eno fo go ia ik il in ir ju kao ki ki ko ko lo li me na nek ni no nor ok oni ono op pla ri  
rin ro se st sto to ta ter ti ti ulu

1	+	-	-	+	-	-			polimera substanco
2	+	-	-	+	-				pag-rimedo ( inverse )
3	+	-	-	+	-	-	-		trakeo-enirejo
4	+	-	-	+	-	-	-	-	variado de la voĉa sonalto
5	+	-	-	+	-				spasme elspiri aeron brue
6	+	-	-	+	-	-			tre fleksiĝema
7	+	-	-	+	-	-	-		kunigi per konduktilo
8	+	-	-	+	-				simbolo N
9	+	-	-	+	-				penetraĵo de eklezia arto
10	+	-	-	+	-	-			ia monstro
11	+	-	-	+	-				Azia regno
12	+	-	-	+	-	-			ĉesigi laboron interkonsentite
13	+	-	-	+	-	-			ia ciklono
14	+	-	-	+	-				opozicii
15	+	-	-	+	-				agavac-arbo
16	+	-	-	+	-				azia ĉefurbo
17	+	-	-	+					penadi atingi ion
18	+	-	-	+	-	-			koksosto
19	+	-	-	+	-				loko en cirko-centro



### VERTIKALE

1. Laŭhore pagata servistin'. Ag' kurbigi ion.
2. Ost' de la pelvo. Subordo de reptiloj, kiel igvano. Ag' de iu, kiu fondas ion.
3. INV: ne cedanta al premo. Kronologiaj historiaj rakontoj de Tacito.
4. INV: Ĉefurb' de Zimbabvo. Kuir' viandon en saŭco (verbo). Surf'ac'.
5. Refaldita ŝtof. Patr' de patro. Krimhor' en krimromanoj.
6. Paleotika prahom'. Sklava servistin' en haremo.
7. Adept' de metafizika teorio. Mara mamul' kun longaj kaninoj. Prefikso signifanta triiiono.
8. Kong' antaŭ 1997. Transformis felojn en ledon. Sufikso esprimanta kolekton. INV: sibera river'.
9. INV: Eligi klaran sonon. Partikulo. Granda cetac'. Peza maso de ŝtono.

### 2 - krucvort-enigmo


( dankon al nia kontribuanto Joël Grandjean, kiu denove verkis ĉi tiun enigmon ).

#### HORIZONTALE:

1. Grup' de insularoj en S. Pacifiko.
2. Antikva roma moner'. Tersurf'ac'. Sufikso.
3. Erupcia, kontaĝa febr'.
4. INVERSE: akuŝbuf. Oleandr'.
5. INV: usona ŝtato.
6. Arb' ofte parazitita. Ĉi', kion oni portas por kovri sian korpon.
7. Ne kapablaj je granda peno.
8. INV: proporci'. Vorto uzata por rifuzi.
9. Lerne'j por estontaj pastroj.
10. Regnokodo de Turkio. Giganta homo.
11. INV: eligi sonojn harmonie.
12. Intejekcio. Organ' en ventro.
13. Artikolo. INV: disko turniĝanta ĉirkaŭ akso.
14. Kolekt' de la plej malgrandaj fonologiaj unuoj.
15. Utila insekt'. Konjunkcio.
16. Membro de religia komunumo.
17. Surkapa ornamaĵ'. Tranĉaĵ' de viando por rosti.
18. INV: Vorto uzata por aserti. Grupo de personoj kiuj havas komunajn opiniojn pri ilia fako.

hungara ret-humuro

"Szépen fejlődika gyermek ...  
Akar E-mailt küldeni neki?"



"Bone kreskas la infano ...  
Ĉu vi volas sendi ret-mesaĝon al ĝi?"

( sendis nia kontribuantino Julia )

Solvo de la "mistera krado" ( 151 ) ...

P	L	E	N	K	O	N	S	C	I	I	
P	R	I		S	I	A		S	T	U	L
T	E	C	O		E	S	T	A	S		S
I	G	N	O		D	E		I	N	T	E
L	I	G	E	N	T	E	C	O			



# Ni provu rideti!



Dezirante vendi sian veturilon, aŭtomobilisto algluas sur la malantaŭan vitron, slipeton, sur kiu kuŝas la numero de lia poŝtelefono.

Survoje al sia laborejo, li iĝas tre obeema je la trafik-regularo kaj okulumas ofte al la takimetro.

Subite, eksonas la telefono. Li kaptas ĝin kaj aŭdas ...

"Bonan tagon, trafik-polico, ni sekvas vin kaj havas intereson pri via veturilo... Bonvolu, ni petas, atingi la etan auto-lasejon, kiun ni vidas dekstre, kaj tie halti ...".

Grrrr!



Humuro por "emeritoj" ...

Oni frapas ĉe la enirpordo ..

"Bonan tagon, sinjoro, ĉu vi ne dezirus donaci ion por la urba maljunulejo?"

Jen ekkrias la edzo ... Jozefin', surmetu vian mantelon kaj preparu vian valizon!".



Du virinoj, ne plu junaj, informiĝas ĉe la bilet-giĉeto de kinejo:

"Ĉu vi ion faras por maljunaj spektantinoj?"

- Memkompreneble, ni vekas ilin je la fino de la filmo!".



Humuro en elementa lernejo ...

Tri knaboj babilas dum la paŭzo pri la naskiĝo de la beboj.

"Ĉe ni, informas la unua, la bebon alportas cikonio sur la malsupran randon de la fenestro!".

La dua klarigas:

"En la ĝardeno, en la kerno de dika brasiko, malkovriĝas la bubeto!".

Iom hezitema, kvazaŭ honta, aldonas la tria:

"Hejme, ni estas tiom malriĉaj, ke la bebon panjo devas mem naski!".



En psikiatra hospitalo, vizitanto deziras informiĝi pri la uzitaj kriterioj, kiuj indikas, ke malsanulo devas nepre iĝi paciento de la fak-instituto.

"Nu, tre simple! Ni plenigas bankuvon je akvo kaj ni proponas al la malsanulo kuleron, tason... kaj sitelon. Ni petas lin malplenigi la bankuvon.

- Mi komprenas, diras la vizitanto, persono normale mensdotita elektos la sitelon, ĉar ĝi estas pli volumena!

- Ne, replikas la kuracisto, persono normale mensdotita forigos la truŝtopilon!... Ĉu vi deziras ĉambrom kun balkono?"



Pri "malsana" Irlando ...

Inspektoro pri funkciado de kamparaj bankoj alvenas en perditan vilaĝon, kaj malkovras pardono de la loka banko larĝe malfermita.

Li eniras, laŭiras koridoron kaj en eta laborĉambro ekvidas la direktoron, kiu kartludas kun la kasisto, kun la sekretariino kaj kun alia deĵoranto.

Celante admoni severe la kvaropon, li konektas la alarmilon. ... Tuj muĝas sireno kaj silento denove estiĝas.

Post unu minuto prezentiĝas kelnero de najbara kafejo, alportante platon kun kvar novaj bierboteloj! ...



Instruisto pri matematikoj redonas al ĉiu lernant(in)o korektitan taskon...

Alparolante unu el ili:

"Klasika problemo pri difektita krano, kiu lasis akvon elflui... Vi ne proponis iun solvon, sed skribis nur iun nombron kun dek ciferoj!... Kion tio signifas?"

- Temas pri la telefonnumero de mia patro, li estas plumbisto! ...".



En la ministrejo pri laboro, oficisto alportas al iu fak-responsulo dikan dosieron ...

"Jen, sinjoro, rezultoj de la studado pri neleĝa laboro ...

- Sed ne al vi mi petis prizorgi tiun dosieron!"

- Konsentite, sinjoro, sed la taskon mi plenumis por helpi la kolegon, kiu algluas novan tapeton en mia loĝejo"



Iu farmistino alparolas sian edzon...

"Morgaŭ ni festos nian geedziĝdatrevenon... Mi buĉos nian dikan meleagrino ...

- Nu, karulino, kial vi deziras plenumi venĝon, mortigante senkulpan beston! Mi preferas, ke vi ne invititu vian stultan kuzon, kiu responsas pri nia unua renkontiĝo!"



En la metroo, en Parizo, premas sin unu kontraŭ la alian la uzantoj, kiuj ĵus forlasis sian laborejon. Iu viro, kvazaŭ "gluita" al juna virino, flustras al ŝia orelo:

"Vi estas vere krak-manĝinda belulino! ...

- Jes, eble, ... sed ĉu vi scias, ke la bonedukitaj viroj ne manĝas per la fingroj? ... ».



Famkonata ĥirurgo, reveninte hejmen post laboro, sidis sur sofo, ekrigardis televidan novajelsendon, kiam sonoris telefono. La kuracisto trankvile respondis kaj aŭdis ĉe alia flanko voĉon konatan de kolego.

"Ni bezonas kvaran personon por ludi je kartoj ... diris la amiko.

- Mi tuj venos!" flustris la kuracisto.

Kiam li vestiĝis por foriri, lia edzino demandis

"Ĉu estas grava?"

- Jes, sufiĉe grava" diris impresodone la kuracisto ... verdire, ĉeestas surloke jam tri aliaj kuracistoj!"





1 - Survoje al la Azia Kongreso, soifas nia amiko *Pierre Huré* sur kajo de la transsiberia trajno ! 2 - Amika rondo ĉe tablo dum la ILEI\*\*\*-konferenco en *Matanzas*. 3 - Daŭre tra la mondo biciklas *Roz'* kaj *Cyrl* ! Jen ŝi sur landvojo de *Gvatemalo* ( vidu reportaĵojn en la bulteno ). 4 - Konigi esperanton longe de la kanalo *Rodano-Rejno* ... 5 - Denove famiĝis « *Interkant'* » ! Ĉi tie dum la *UK* en *Kubo*. ( *Famo*, baritono en la ĥoro, distros nin dum nia

\*\*\* ILEI : Internacia Ligo de Esperanistaj Instruistoj

foto 1 : *Tatjana Loskutova* - foto 2 (?) - foto 3 : *Cyrl* - fotoj 4 kaj 5 : *André Grossmann*